

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 499

MAJO 1947

DENOVE HAVEBLA



## VIVO DE ZAMENHOF

EDMOND PRIVAT

La mondkonata verko pri la vivo de la aŭtoro de Esperanto

---

Bindita      133 paĝoj      12 ilustraĵoj

Prezo 5 ŝilingoj anglaj ; aŭfranko 4 penceoj  
(22 respondkuponoj)

---

*Eldonita de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.**

*Mendu ĉe via enlanda libroservo aŭ ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

# ANONCETOJ

*Kosto : du pecnoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponono por ĉiu duo da vortoj.*

**Ne-Katolikoj**, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Brita oficiro deziras** korespondi kun geislamanoj, J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

**Vegetara gazeto** aperos. Petu informojn de Christian Hougaard, St. Blichersvej 43, Aabyhoj, Danlando.

**Deziras korespondi pri Budhismo**, BM/FH7V, London, W.C.1, Anglujo.

**S-ro Francisco Poses**, San Gines 4, Tarrasa, Hispanujo deziras korespondi pri popoloj, muziko, kaj literaturo.

**S-ro Alfonso Pérez**, Arquimedes 128 piso, Tarrasa, Hispanujo volonte korespondos kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj.

**S-ro Mateo Aresté**, H. de Codo 548, Tarrasa, Hispanujo serĉas ĉiulandajn Esp.-amikojn. Certe respondos.

**S-ro Juan Chaler**, San Mariano 159, Tarrasa, Hispanujo interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn kaj korespondas pri sporto.

**S-ro Antolí Chaler**, Era 37, Tarrasa, Hispanujo deziras korespondi pk. kaj letere.

**S-ro Emilio Mur**, Carretera Moncada 147, Tarrasa, Hispanujo deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj korespondi pri literaturo.

**Hispana dentteknikisto** deziras korespondi kun alilandaj kolegoj. Ricardo de Luna, Paseo de Colón 5,I, Barcelona, Hispanujo.

**Juna hispano** deziras korespondi kun gejunuloj, ĉefe skandinavaj. S-ro Manuel Hernández, Maria Blasco 19, Valencia (Malvarrosa), Hispanujo.

**Deziras interŝanĝi pm.** kun ĉiuj landoj S-ro José Bernadich, Manso 60, Sabadell, Hispanujo.

**Volonte interŝanĝos pm.** kun ĉiulandaj kolektantoj S-ro Ramon Malloire, Virgen de Montserrat 69, Sabadell, Hispanujo.

**Deziras interŝanĝi** ilustritajn poŝtkartojn kun ĉiuj landoj F-ino M. Dickson, "Normanhurst", Old Rectory Road, Farlington, Portsmouth, Anglujo.

**Mi deziras korespondadi** pri diversaj temoj kun geeksterlandanoj (komencantoj) Kupa Bohumil, Havlíčková 1016, Pardubice, Ĉeĥoslovakujo.

**Senpage interŝanĝas** tutmonde novajn lernolibrojn por 6-12 jaraĝaj ĝelernantoj Corrado Cerri, Casale Litta (Varese), Italujo.

**Koresponda Centro de SEF**, Köping, Svedujo, peras korespondadon inter svedoj kaj alilandanoj.

**Sveda instruisto** de popollernejo deziras korespondi kun britaj kolegoj pri profesiaj aferoj. Proponas interklasajn korespondadon en la angla lingvo. S-ro Allan Berglund, Fredsgatan 3, Skövde, Svedujo.

**Kiu scias la sorton** de Sinkind Schöenberg (surdmutulo), el Varsovio, Polujo? Bonvolu sciigi D-ron I. L. Kinney (surdmutulo), Duquesne, Pa., Usono.

**Instituto de Administrado Trafika** : Vic-prezidanto deziras korespondi kun interesatoj pri transportaj temoj. Bonvole skribu al BM/DNJJN, London, W.C.1, Anglujo.

**Deziras korespondi** kun ĉiuj landoj; certe respondos, S-ino Martha Björk, Iisvesi, Finnlando.

**Tutmonda korespondado** pri interesaj temoj dezirata. Skribu antaŭ fino de Majo al Ostenda Grupo Esperantista, Kristinastraat 57, Ostende, Belgujo. Respondo garantiata. Afranku filatele.

**Venu al Danujo!** Someraj Kursoj en Helsingor (17-24.7.47) kaj Hadsten (27.7-2.8.47). Ebleco viziti Kopenhagon kaj la SAT-Kongreson en Aarhus (2-7.8.47). Pluaj informoj de L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Aarhus, Danujo.

**Sviso deziras rilati** kun angloj pri Kvakerismo, lingvoj, teksaĵoj, fotodiapositivoj. Anderegg-Chevally, Horn am Bodensee, Svislando.

**Dekdu 17-jaraĝaj skoltoj** deziras korespondi kun gejunuloj de tuta mondo. Certa respondo. Esperanto-Rondo ĉe Śniadecki Gimnazio, Partyzancka 56, Pabianice, Polujo.

**Pola skolto**, lernanto 17-jara, filatelisto, deziras korespondi kun junularo de tuta mondo. Certa respondo. Ryszard Badowski, Zamkowa 21, Pabianice, Polujo.

**Urbaj inĝenieroj kaj arkitektoj** alskribu kaj sendu novaĵojn en via metio al: urba inĝeniero W. Gidner, Kyrkotorgsgatan 1, Karlskoga, Svedujo; arkitekto Hj. Isander, Bregardsgatan 46, Karlskoga, Svedujo. Afranku filatele!

**S-ro Mirek Galuška**, Ostroh, Ĉeĥoslovakujo deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

**S-ro Jaromir Pavlacký**, komercisto, Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo serĉas gesamideanojn, kiuj povas sendi kelkajn pecojn de vanilo kaj kudrilojn por kudromaŝinoj. Ankaŭ mi petas specimenojn de ŝaŭmetataj porveroj por trinklimonadoj, kiujn mi ankaŭ fabrikas. Plue petas informojn pri prezoj de ĉefaj nutraĵoj. El landoj kun kuponara sistemo bonvolu sciigi monatajn porciojn. Mi rekompencos laŭ via deziro.

**Deziras korespondi** kaj interŝanĝi nacilingvajn gazetojn kun ĉiu lando Reg. Gill, 10 Pipworth Road, Sheffield, Anglujo. Malnovaj amikoj volu sciigi novajn adresojn.

**Soleca soldato** deziras ian literaturon Esperantan. 3456 Prime, High Street, Swavesey, Cambridge, Anglujo.

**Irlandano**, S-ro Eoghan O. Dabharáin, Aiséiríge, Sráid Eoin, Caiseal Múmhan, Irlando, deziras korespondi kun ĉiulandaj fraŭlinoj, pli ol 20-jaraĝaj, pri filmoj, sportoj, k.t.p., kaj interŝanĝi ilustritajn gazetojn kaj fotografiaĵojn.

**Koncertistoj! Orkestristoj! Muzikinstrument-komercistoj!** Arcinstrumentoj garantiataj ĉe Pietro Tatar, IEL-fakdelegito, instruisto ĉe Internacia Liutlernejo, Via Damiano Chiesa 3, Cremona, Italujo.

**Danove Guiseppe**, Canelli (Asti), Italujo interŝanĝas poŝtmarkojn de ĉiuj landoj.

**Piazza Mario**, Via Francia 7/1 A, Genova, Italujo interŝanĝas eŭropajn poŝtmarkojn.

**Bankoficiistoj al laboro!** Koncentrigu fortojn! Ĉe Banco di Roma, Filio de Milano, vigla Esperanta grupo laboras. Konatigu kun ni. Celu: planlabori por enkonduki Esperanton en bankojn por la internacia korespondado. Adreso: Esperanta Grupo, Banco di Roma, Filio de Milano, Italujo. Al ĉiu respondo certa.

**Filatelistoj!** Sendinte al S-ro Enrico Boccardo, Piazza Vittorio Veneto 6, Lava Lavagna (Genova), Italujo, 50-100 aŭ pli da poŝtmarkoj el via lando vi ricevos saman kvanton, egalan valoron.

**Artpentristo**, kun edzino, deziras verki dum monato en eksterlando, negrave kie. Eventuale kontraŭ pago, sed estas ankaŭ preta reciproke gastigi la akceptintojn. H. Hierck, Prinses Mariestraat 24, Den Haag, Nederlando.

**Deziras tutmonde** interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. Respondas ĉiam. D-ro Jan Rupp, kuracisto, Lany 1, Litomyšl, Ĉeĥoslovakujo.

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

40a JARO N-RO 499 (5)

MAJO 1947

Fondinto :

H. HODLER

Redaktoro :

HANS JAKOB

ESPERANTO, PALAIS WILSON

GENÈVE, SVISLANDO

**OFICIALA ORGANO  
DE UNIVERSALA**

**ESPERANTO-ASOCIO**

(IEL kaj UEA kunigitaj)

**Eldonejo**

(al kiu oni sendu ĉion pri  
reklamoj kaj administrado)

HERONSGATE, RICKMANSWORTH

HERTS., ANGLUJO

**Jara abono :** 7 ŝil. 6 pencoj  
(kun membreco kaj jarlibro  
10 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

**Tarifo por reklamoj :**

1 paĝo - £5 anglaj  
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj  
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj  
⅓ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

**Anoncetoj pri korespondado :**

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj

**Eldonnumero :**

7,000

Legantoj en 65 landoj

## DE VARSOVIO 1937 AL BERNO 1947

Per la nuna numero de ESPERANTO komenciĝas nova fazo en la Esperanto-movado kaj ni deziru, ke ni daŭrigu la vojon de la *evolucio*, ne sekvan plu la emon je *revolucio*.

Por kompreni la nunan situacion en la internacia Esperanto-movado, necesas reiri al Varsovio 1937, la tempo de la 29-a kongreso kaj de la 50-jara jubileo de nia lingvo. Nia afero respegulis tiam tute fidele la ceteran mondon. Malfido, manko de celkonscio, ĵaluzo, financa ĥaoso kaj fine la minacanta milito, ĉio tio ĵetis siajn ombrojn sur nian aferon. Hodiaŭ kun la distanco gajnita la interligiloj estas klare videblaj. Erariga estis ekzistinta opinio, ke ni povus resti ekster la ĝenerala disordigo.

En Varsovio 1937 oni provis rekunigi la du ĉefajn organizaĵojn nepolitikajn, alitempe nomitajn *neŭtralaj*. La tempo ankoraŭ ne venis, la premisoj de sincera rekuniĝo ne ekzistis. Venis la milito, Varsovio estas detruita kaj ankoraŭ ni Esperantistoj staras antaŭ ruinoj de pli ol duonjarcenta penado. Estis do logike doni sekvon al ĝenerala deziro kunigi la du ĉefajn organizaĵojn por forigi gravan malhelpon al la laboro de rekonstruado. La farita aranĝo respondas entute al la *moral*a postulo de la Esperantistoj fini konflikton, kiu perdis sian sencon; ĝi respondas ankoraŭ pli forte la *materian* neceson eviti multekostan paralelecon de penado kaj de elspezoj.

Ekzistas kelkaj baroj ne facile surireblaj. Sed dank' al la bona volo reciproka ankoraŭ ĉi tiuj opozicioj malaperis.

En kio do ekzistas en kelkaj vortoj la Akordo de Berno?

(1) Post la necesa aliigo de la Statuto ekzistos nur unu (neŭtrala) Esperantista organizaĵo, kun la nomo Universala Esperanto-Asocio.

(2) Estas du oficejoj, unu en Britujo, la dua en Svislando. La unua okupas sin pri la ĝenerala gvido de la aferoj, la administrado, kaj la dua pri la servoj.

(3) Aperas unu jarlibro redaktata en la oficejo en Britujo. Ĝi enhavas la kutimajn informojn, ĉefe la adresaron. Dua enciklopedia jarlibro kun ĝenerala enhavo estas antaŭvidata, sed ĝi estos aparta eldonajo.

(4) ESPERANTO, la organo de U.E.A., estas la sola gazeto, kiu unuigas la du periodaĵojn. Ĝin redaktas la ĝisnuna redaktoro laŭ la spirito de ĝia fondinto, H. Hodler.

Tio estas la kvar karakterizaĵoj de la unuecigita ne-politika aŭ neŭtrala movado. Pri la *apliko* de la nova aranĝo la plenumantaj povoj de la organizaĵo (landaj asocioj, komitatanoj, kaj ĉefdelegitoj) ricevos apartajn informojn.

Ni estis kontentaj anonci al vi la faritan Akordon. Ni estos feliĉaj se la efektivigo pravigos la iniciatintojn dezirantaj ke ni donu ekzemplon de paca kunlaboro, malgraŭ malsameco de opinioj.—H.J.

# LA FUNKCIADO DE LA UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(I.E.L. kaj U.E.A. kunigitaj)

Per la Akordo de Berno 1946 la du neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj internaciaj, la Internacia Esperanto-Ligo kaj la Universala Esperanto-Asocio kunigas en unu sola organizaĵo kies laborojn plenumas du oficejoj—unu en Britujo kaj alia en Svisujo. Tiu ĉi kunigo de la du organizaĵoj laborantaj por la sama celo estas feliĉa solvo de problemoj, kiu venenigis la atmosferon esperantistan. Ĝis ĉio estas absolute klara kaj neta, bone fundamentita kaj zorge ellaborita en la detaloj, servu jena informaro, alfabeto aranĝita por gvidi demandinton pri tio aŭ alio.

**Adreso :** Ĉio rilatanta al administrado, gvido ĝenerala de la organizaĵo, sendu al Universala Esperanto-Asocio, Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Ĉio, kio rilatas la redakcion de la gazeto ESPERANTO kaj la servojn sendu al Universala Esperanto-Asocio, Palais Wilson, Genève, Svisujo.

**Administrado :** Ĉio kio rilatas la administradon, la aliĝojn, la kotizojn, abonojn, anoncojn, la Jarlibron, oni sendu laŭ la ĝisnuna maniero ĉu per la ĉefdelegito ĉu rekte al U.E.A. Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

**Anoncoj :** Anoncoj kaj reklamoj por la gazeto kaj por la Jarlibro estu sendataj al la Administra Centro en Anglujo (vidu sub Adreso). La tarifo por la anoncoj en la gazeto troviĝas sur la unua paĝo.

Por la Jarlibro 1947 ; 4 Anglaj pundoj por unu paĝo kaj proporcie ĝis kvaronpaĝo (minimumo).

**Bibliografia Servo :** Ĝin prizorgas la Serva Centro en Genève. La laboro konsistas en la registrado de la aperintaj verkoj kaj en la preparo de bibliografia informaro ĉiujare, kiel tio okazis ĝis la jaro 1933. Ĝi kolektas ĉiujn dokumentojn pri Esperanto, la movado, la demando pri internacia lingvo ĝenerale, ĉio kunigita en la Biblioteko de U.E.A., troviĝanta en Palais Wilson. Sub certaj kondiĉoj ĝi pruntas librojn al personoj dezirantaj studi ion kaj ne povantaj trovi tion kion ili bezonas en sia lando. La eldonistoj estas invitataj sendi po unu ekzemplero de siaj eldonaĵoj al tiu ĉi servo.

**Delegitoj :** La Delegitoj de I.E.L. kaj U.E.A. baldaŭ formos unu tutajan. Iliaj nomoj aperos en la Jarlibro. Kie estas du delegitoj en unu loko, ni aranĝos la aferon kiel eble plej baldaŭ. Ĉio kio rilatas la adresaron de la Delegitoj, la administradon k.t.p. estas afero de la Administra

Oficejo en Anglujo. Ĉio rilatanta la servojn de la Delegitoj, estas afero de la Serva Oficejo en Genève.

**Ekspozicia Servo :** aranĝas materialon por Esperanto-ekspozicioj, kontraŭ simpla repago de la propraj kostoj kaj afranko. Nuntempe la materialo estas malmoderniĝinta kaj nur parte uzebla. Post ioma tempo estas atendeble ke nova materialo povos esti disponigata al la interesuloj. Oni sin turnu al la Oficejo en Genève, Svisujo.

**ESPERANTO** estas la oficiala gazeto de la organizaĵo. Ĝi portas la titolon ESPERANTO, Internacia Revuo Esperantista, kaj estas redaktata laŭ la deziro de la fondinto kaj la Akordo de Berno 1946. Ĝi aperas monate kaj estas presata en Britujo.

**Fakterminaroj :** Ni esperas eldoni novan fakterminaron en ĉiu jaro. Samideanoj, kiuj volas helpi en tiu rilato, skribu al la Oficejo en Anglujo.

**Gazeto :** La oficiala gazeto estas ESPERANTO (vidu ESPERANTO kaj Redakcio).

**Hotela Servo :** Tiu ĉi servo celis konigi al vojaĝantaj Esperantistoj laŭtipan hotelon, eventuale kie estas Esperantista personaro. Pro la deviga interrompo de la turismo dum 1939–1945 tiu ĉi servo estas reorganizota tuj kiam montriĝos ke la premisoj ekzistas.

**Interhelpo :** La Esperantista Interhelpo, kreita en la jaro 1936, celas helpi la Esperantistajn viktimojn de la Nazi-teroro, per konsiloj pri enmigrado, dokumentoj kaj alie. Tiu ĉi servo, kiu etendiĝis grandskale, daŭrigas sian agadon laŭ la disponeblaj rimedoj. Ĝi povas interveni en multaj rilatoj pro la feliĉa situo de la sidejo en Genève, kie troviĝas krom la Internacia Ruĝa Kruco multaj organizaĵoj por helpi la viktimojn. La Esperantista Interhelpo povas peri la sendon de nutraj-pakaĵoj, de medikamentoj, malgrandaj objektoj ne bezonantaj permeson por eksporti. Sed ĝi ne povas fari donace, ĉar ne ekzistas fondaĵo por tiu ĉi celo.

**Jarlibro :** La Jarlibro estas redaktata de C. C. Goldsmith kaj ĝi enhavas la kutiman informaron pri la movado, ĉefe la adresaron de la organizaĵoj kaj de la Delegitoj. Ĉion pri ĝi oni sendu nur al la Oficejo en Anglujo.

**Kongreso :** La jara kongreso de Esperanto estas organizata sub la kontrolo de la Administra Centro en Anglujo. Pri aliĝoj al la 32-a Kongreso, okazonta 1947 en Berne, oni sin turnu al Esperanto-Kongreso, Bundesgasse 20, Bern, Svisujo.

**Propaganda Servo :** Ĝi celas aranĝi unuformajn praktikajn propagandilojn, broŝurojn k.t.p. kaj eldonas aŭ eldonigas la ŝlosilojn de Esperanto.

**Redakcio :** La redakcio de la gazeto *ESPERANTO* troviĝas en Palais Wilson, Genève, Svisujo, kien oni sendu ĉion (krom reklamoj) kio rilatas al ĝi. Redaktas la gazeton honorofice Hans Jakob laŭ la ideoj de ĝia fondinto, la Akordo de Berno, kaj laŭ la direktivoj de la Estraro.

**Servaro :** La Servoj de U.E.A. transiras al la unuigita organizaĵo. La aranĝon kaj plenumon de la servaro faras la Oficejo en Genève, Palais Wilson. Por la momento la servaro estas la jena : Bibliografia Servo, Esperantista Interhelpo, Hotela Servo, Reklama Servo, Servo de reserĉado, Turisma Servo, Propaganda Servo.

La Servo pri librovendado funkcias de la Oficejo en Anglujo. La servoj, kiujn plenumas la Delegitoj de la organizaĵo estas prilaborataj laŭ lia enhavo kaj kunigota en regula statistiko. Tion egale plenumas la Servo-Centro, Palais Wilson, Genève.

**Statuto :** Provizore validas la statutoj de la du organizaĵoj I.E.L. kaj U.E.A. kun la amendo de la Akordo en Berno. La nova statuto de la kunigita organizaĵo estas pretigata. Pri la administraj detaloj ŝanĝigantaj pro la aludita akordo, aperos se necese, komunikoj.

**Ŝlosiloj de Esperanto :** Ĉion pri tio oni sendu al Palais Wilson, Genève.

**Turisma Servo :** Tio estis unu el la plej sukcesintaj servoj. Celas eldonigi gvidfoliojn kaj turismajn presaĵojn en Esperanto, ilin disdoni inter la Esperantista publiko. Kreis ankaŭ unuformajn gvidfoliojn aldoneblajn al leteroj. Kolekto da tiaj presaĵoj formis belegan objekton por ekspozicioj atestantaj la praktikan uzadon de la lingvo.

Pri ĉio rilatanta la eldonon kaj la disdonon de turismaj presaĵoj oni sin turnu al la Oficejo en Genève.

### Delegita Servo

La delegita reto de I.E.L. estas unu el la plej valoraj pruvoj pri la praktika utilo de la internacia lingvo. Pere de tiu sistemo de interhelpo multaj Esperantistoj ricevas servojn ĉiujare. Mi mem ĵus profitis tiun bonvolan helpon kaj mi kuraĝas raportiti la detalojn kun espero, ke ĝi havos intereson por la Esperantistaro.

En la aŭtuno de 1944 mi deĵoris kiel ĉifristo en R.A.F.-tendaro apud Livorno, Italujo. Unu tagon mi ricevis de mia superulo radian alvokon, ke mi tuj iru ĉe li kun la sekretaj libroj, elektraj maŝinoj kaj mia personaro. Ni do ekvojaĝis en la speciala aŭtovagono kaj kiam noktiĝis ni trovis nin en la montoj de Fabriano. Ĉar estis evidente, ke ni ne povos atingi Ancona-n tiun tagon, mi decidis tranokti tie. Serĉante taŭgan

lokon por bivaki, mi ekvidis dometon apud akvofalo kiu funkciigas elektran generatoron en povdomo, kaj mi havis la penson peti permeson starigi tie niajn tendlitojn. La dommastrino tuj konsentis, kaj la tri serĝentoj baldaŭ faris al si komfote en la vestiblo, kaj mi, post insistado de la domanoj, devis dormi supre.

Frumatene ni matenmanĝis kaj rapidis for, dankinte niajn gastigintojn.

Du monatojn poste, mi devis trapasi Fabriano-n survoje al Napoli, kie mi havis la ĝojon trafi ŝipon al Anglujo. Alveninte tagmeze ĉe la dometo, mi haltis dum kelke da minutoj por adiaŭi miajn geamikojn, kaj okazis granda ekscito kiam oni ekvidis min. "Ho, capitano . . . come sta ?" ĝoje ekkriis la sinjorino, kaj la tuta familio varme bonvenigis, kaj poste adiaŭis, min.

Kiam mi troviĝis denove en mia hejmo miaj pensoj ofte forflugis al multaj bonkoraj homoj, kiujn mi renkontis dum mia eksterlanda milit-servo, kaj mi tre volis sendi al la familio en Fabriano salutojn el Anglujo mem. Malfeliĉe, mi konis nek la nomon nek la adreson de la Italoj. Kion fari ?

Mi skribis al la I.E.L.-delegito en Foligno, kelkajn kilometrojn de Fabriano, kaj klarigis mian deziron. Mi petis, ke li trovu la domon laŭ mia indiko pri la akvofalo kaj povdomo. Tri semajnoj pasis, kaj jen venis letero de Foligno kun sendaĵo Itallingva de miaj geamikoj. La delegito bonvolis aldoni Esperantan tradukon. Do mi faris kontakton pere de Esperanto. Alie, mi ne scias, kiel mi povus fari tion.

*F. Douglas Murphy, Anglujo*

### URĜA PETO

#### Al Ĉiaj Oficistoj en Ŝtataj kaj Publikaj Servoj

La Internacia Federacio de Unuigoj de Oficistoj en Publikaj kaj Ŝtataj Servoj, sekve de siaj spertoj pri lingvaj malfacilaĵoj, nun esploras la eblon elekti unu lingvon, kiun oficiale uzos ĝia anaro el diversaj nacioj. La oficialuloj dubas, ĉu Esperanto estas sufiĉe disvastigita por esti praktika solvo. Do urĝe necesas, ke en ĉiuj landoj ŝtatoficistoj kaj oficistoj en publikaj servoj tuj skribu por rekomendi la uzadon de Esperanto al la jena adreso : The General Secretary, International Federation of Unions of Employees in Public and Civil Services, 20 Dryden Chambers, 119 Oxford Street, London, W.1, Anglujo.

Atentu, ke publikaj servantoj inkluzivas : geinstruistojn, poŝtistojn (P.T.T.), oficistojn de ŝtataj kaj urbaj registaroj, de juĝejoj kaj hospitaloj, ŝtatajn fervojistojn, urbajn tramistojn, policistojn k.t.p.

Skribu ankaŭ al via profesia aŭ metia organizaĵo por peti ke ankaŭ ĝi skribu al la ĉi-supra adreso por apogi Esperanton. Venko en ĉi tio estos gravega antaŭenpaŝo.

# RAPORTOJ PRI LA MOVADO

## AŬSTRUJO

Reaktiviĝis la supertendenca kaj tre ŝatata vojaĝunuigo "La Migrulo", kiu antaŭ la milito peris vojaĝojn kaj vizitojn de siaj membroj al multaj mondpartoj. La sukceso estis sekvo de malaltaj prezoj, kiujn ebligis tio, ke la organizaĵo laboris sen profito. Multaj el ĝiaj 3000 membroj deziras, ke la unuigo alprenu kaj praktike apliku Esperanton en ĝiaj rilatoj kun la mondo. En ĝia ĉiumonata organo *La Migrulo* jam aperis artikolo pri Esperanto. Tre certe, salutletero aŭ karto al la direktoro, S-ro Ebner Josef, Graz, — St. Veit, multe helpus.

J. Eder

## ĈEĤOSLOVAKUJO

La Revolucia Sindikata Movado, kiu estas unu el la plej grandaj organizaĵoj en Ĉeĥoslovakujo, enkondukis Esperanton en la temaron de siaj "Lernejoj de Laboro". Ĉar iuj el la Estraranoj de la movado ankoraŭ opinias, ke pli grava lingvo estus preferinda (ekz. la Rusa), helpus se partioj kaj organizaĵoj skribus al Revolučné odborové hnutie, Zilina, Slovakujo.

**Enkonduko en lernejojn**—Responde al letero de la Esperanto-Asocio de ĈSR la Ministerio pri Instruado citis sian dekreton de la 6-a de Decembro 1946, kies teksto estas: "... provizore, dum la tuta instruado devas celi riparon de malbonaĵoj kaŭzitaj de la Germana okupado, ne estas eble trakti pri enkonduko de novaj fakoj, eĉ ne laŭvolaj." La dua alineo de la dekreto tekstas: "Sed via sugesto estos pri-traktata dum ellaborado de novaj definitivaj instruplanoj por komercaj lernejoj, kiuj estas enkondukotaj en unuajn jarojn komence de la lernejjaro 1947/48." La Asocio proponis du siajn membrojn, profesorojn, kiel ekspertizistojn.

## DANUJO

La Centra Dana Ligo en la nuna jaro denove organizas Somerajn Kursojn, kiuj donos al la partoprenantoj la okazon studi la lingvon ĉi-matene kaj praktiki ĝin ĉiutage. Kiel kutime, la kursoj okazos laŭ semajna bazo: —

(a) unu semajno en Elsinør (Internacia Altlernejo) de la 17-a ĝis la 24-a de Julio. Partoprenantoj povos pasigi duon da tagoj en Kopenhago survoje al kaj de la urbo de *Hamleto*. Krome, estos facile fari mallongajn ekskursojn en Svedujon (de Kopenhago ĝis Malmö, kaj de Elsinør ĝis Hålsingborg). Neniu vizo estas necesa por viziti Danujon kaj Svedujon.

(b) unu semajno en Hadsten (Norda Jutlando) de la 26-a de Julio ĝis 2-a de Aŭgusto, oportune laŭ tempo kaj loko por poste ebligi partoprenon en la internacia kongreso de S.A.T. (2-7 Aŭgusto).

La prezoj estas relative nealtaj kaj la nutraĵo estas abunda en gastema Danujo.

M.C.M.

## GERMANUJO

Sub la nomo Unuiĝo de la Persekutitoj de la Nazismo nun kolektiĝas la ĝis nun sub diversaj nomoj ekzistantaj grupoj de politikaj eksmal-liberuloj kaj viktimoj de la iama reĝimo. En Hamburgo okazis 1-2an de Februaro Konferenco de tiu organizaĵo.

La Unuiĝo kreis aparaton por reciproka interhelpo inter Germanoj, kaj inter Germanaj kaj eksterlandaj samsortanoj. La Hamburga grupo nun havas 8,000 membrojn kaj posedas 3 infanhejmojn, 1 junulhejmon, 2 domojn por senhejmuloj kaj eksterurbaj kamaradoj, 1 sanatorion k.t.p.

Krom tre multaj laboroj la Unuiĝo sin okupas pri informservado, serĉado kaj identigado de mortintoj kaj malaperintaj homoj. Dum 1946 oni ricevis 52,733 informpetojn pri homoj ankoraŭ mankantaj. La unuiĝo kompilis kartaron kun la nomoj de 500,000 eksmalliberuloj el ĉiuj landoj.

Oni uzas ankaŭ Esperanton, kaj kun informpeto oni bonvolu kunsendi respondkuponon. Adreso Herman Theobold, Hamburg—Gr. Flottbek, Im Hag 18, Germanujo.

## HUNGARUJO

La revuo *New Hungary*, Anglalingva eldono, sendas al petintoj senpagan ekzempleron. Ĝi volas ankaŭ enkonduki informojn pri Esperanto en Mez-Eŭropo. *New Hungary*, Uj Magyarorszá, Budapest V, Zoltán-u. 6.

## JUGOSLAVUJO

La 7-an ĝis 9-a de Junio okazos en Varaždin la XIII-a (la unua post la milito) kongreso de Jugoslavaj Esperantistoj.

Dum la kongreso oni okazigos ankaŭ la II-an Balkanan Konferencon de Esperantistaj delegitoj de Bulgarujo, Rumanujo, Hungarujo kaj Jugoslavujo.

Alloga programo de ekskursoj kaj sociataĵoj estas aranĝita. Oni varme bonvenigos ĉiujn samideanojn. Ĉiujn poŝtaĵojn pri la kongreso direktu al Božena Vaněk, Varaždin, Zenska stručna škola, Jugoslavujo.

## NEDERLANDO

La 22-an de Decembro 1945 la reprezentantoj de la estraroj de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj (F.L.E.), la Nederlanda Esperantista Unuiĝo (L.E.E.N.), la Nederlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj (N.K.) kaj la Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj (K.U.N.E.) fondis "Nederlanda Centra Komitato Esperantista" (N.C.K.E.), kies celo estas "reprezenti la Nederlandan Esperantistaron antaŭ ŝtataj kaj publikaj instancoj, kaj okupi sin pri ĉiuj taskoj, kiuj estas komunaj al la partoprenantaj asocioj."

Post unujara agado, estas evidente, ke la iniciato estas tute pravigita. Granda sukceso kronis la kunagadon kaj montras la vojon per imitinda ekzemplo al tiuj landoj kie ankoraŭ luktas unuj kontraŭ aliaj multaj malgrandaj nekunlaborantaj organizacioj.

Konciza raporto pri la jaragado estas havebla kontraŭ respondkuponon ĉe la sekretarioj: Vechtstraat 5, Amsterdam-Z.

## SVISUJO

En la 15-a kaj 16-a de Marto oni festis Svisan Esperanto-Tagon en Luzern. La espero pri forigo de la dueco en la neŭtrala movado kreis novan atmosferon de entuziasmo, ĉar en ĉi tiu lando oni forte sentis la efikojn de la divido. S-ro Nicolaisen, la konstanta sekretario de la U.K. en Bern, raportis pri la laboroj faritaj por sukcesigi la aferon. Post eksigo de S-ro Gilliard, oni elektis S-ron F. Liehti, el Rheineck, prezidanto.

O.W.

## Jurnalismo

Estas fondita Tutmonda Esperantista Ĵurnalistista Asocio. La Estraro estas elektita jene: Prezidanto, ĉefredaktoro C. Hilmer Johanson, Linköping, Svedujo; Vicprezidanto, redaktoro Rich. G. Nielsen, Rudkjøbing, Danujo; Sekretario kaj kasisto, redaktoro Einar Adamson, Varm-landsgatan 18, Göteborg, Svedujo; Vicsekretario, ĉefredaktoro Niilo Kavenius, Turku, Finnujo.

H.L.H.

## Pedagogio—Grava Alvoko

Ni havas gravan okazon montri al nia registaro la praktikeblecon de nia lingvo kaj movado.

Nia Nacia Eduka Ministerio petis nin kolekti dokumentan materialon koncerne la instruadon en la landoj kun kiuj ni kunlaboras. Temas precipe pri informoj rilate al ĉiuj pli gravaj reformoj en la sistemo de instruado aŭ pri reformprojektoj efektivigitaj aŭ preparitaj por traktado en via lando post la lasta mondmilito.

Bonvolu turni vin al viaj aŭtoritatoj, instruistoj aŭ specialistoj en la instruada fako, kun la peto sendi tiajn informojn, aŭ gazetnumerojn en via

nacia lingvo, kompreneble preferinde en Esperanto.

Ni esperas, ke vi antaŭvidas la gravecon de la afero kaj ne prokrastos la plenumon de nia peto. Se vi bezonas samajn aŭ similajn informojn por via registaro, ni plezure staras je via dispono.

*Rumana Esperantista Societo,  
Bukureŝti, Ĉasuta Poŝtala No. 9,  
Rumanujo*

## Radio

Samideanoj en tuta Ĉeĥoslovakujo kaj en la granda eksterlando aŭskultas kun ĝojo la Esperanto-dissendojn el Ostrava. Tiu stacio ne nur dissendas en Esperanto, sed forte simpatias kun nia movado kaj estas inklina helpi ĝin. Oni do bonvenigas leterojn de Esperantistoj ĉiulandaj, en kiuj oni povas doni proprajn spertojn kaj proponojn pri akcelo de la progreso de nia afero. Oni do skribu amase al Radiostacio Ostrava, Ĉeĥoslovakujo.



Ni kaptas ĉi tiun okazon por aludi la 25-jaran laboron sur la Esperanto-kampo de samideano Vladimír Slany en Ostrava, kies fotografajon ni publikigas. Grava estas lia kontribuo al nia afero, ne nur en la propra lando, sed ankaŭ, per lia kunlaboro en Radio Ostrava, en la granda mondo. Gratulon al li, kaj dankon. Ke lia voĉo ankoraŭ longe estu aŭdata!

## Skoltoj

La nove fondita demokrata knabskolta asocio de Hungarujo starigis Esperanto-fakon. Skoltoj sendu saluton, kaj petu informon pri Hungara skolta vivo. Adreso: Budapeŝt V, Nagy Sándor-u. 6. Oni klopodu starigi similan fakon en aliaj skoltasocioj. Tia fako jam funkcias ĉe la Ĉeĥoslovaka.

### Guste Uzu Vian Studtempon

La Usona junulargvidanto, D-ro John Mott, kiun oni antaŭ nelonge Nobelpremiis, iam diris dum prelego "Gusta uzo de la tempo hodiaŭ, kreas la grandan eblon morgaŭ". Sendube ĉi tiu parolo ankaŭ validas pri la tempo dediĉata al studado. Precipe al tiuj, kiuj disponas nur la vesperajn horojn por la studado, estas tre grave, ke ili uzu sian tempon ĉiam laŭcele.

**Studu regule** — Grava kondiĉo de sukcesa studado estas regula laborado. Multaj tre entuziasme komencas, sed post kelka tempo amuzoj forlogas ilin kaj ili prokrastas ĝis morgaŭ. Sed morgaŭ la tasko estas duoble granda kaj la labordeziro sekve de tio verŝajne ankaŭ malpliĝis. Guste uzu la tempon hodiaŭ kaj studu ĉiun tagon.

Povas esti, ke la ankoraŭ ĉiam mizeraj cirkonstancoj en la mondo kaj la zorgoj pri la vivtenado premas. Tamen klopodu studi ĉiutage minimume duonon de horo. Tio helpas estri la malĝojajn, pesimismajn aŭ malkontentigajn pensojn. Ĉi tiu aserto kreskis el propra sperto.

Enprofundiĝante ĉiutage en la studon, oni pli bone enmemorigas la studaĵon. Duonhora, atenta studado estas pli profitdona ol trihora, surpaja.

**Kolektu sciindaĵojn** — Faradu notojn pri ĉio, kion oni studas. Oni povas renkonti atentindaĵojn, kiuj koncernas la studfakon, en revuoj, ĵurnaloj aŭ dum la ĉiutaga laboro. Kolektu tiajn notojn kaj tiel ordigu ilin, ke oni povos senpene retrovi ion bezonatan.

Unuarigarde, tio ŝajnas peniga, sed baldaŭ oni rimarkos, ke oni akiras profiton per ĉi tiu metodo. Krome, la studtemo viviĝas kaj la studo fariĝas ŝatata okupo.

**Studu laŭplane** — Ne studu ĥaose, sed eklaboru laŭ plano, precipe se oni memstare studas. D-ro Mott, kiu mem dum sia tuta vivo strebis al efika uzado de sia tempo, atentigis ankaŭ pri la gravo de planoj. "Homo enplanigu siajn tagojn kaj ĵarojn," li diris.

Konsideru kion vi studos. Pripensu kion vi esperas atingi per la akirota scio. Estas dezirinde, ke oni konvinkigu pri la valoro kiun la studota temo havos. Farinte la elekton, persistu kaj ne lasu devojigi sin fare de kio aŭ kiu ajn.

Kalkulu kiom da monatoj oni bezonos por mastri la elektitan studfakon, kaj kiom da laboro oni povos fari ĉiun semajnon. Faru programon kaj obeu ĝin, aŭ prefere iom antaŭ ĝin. Tia programo donos ankaŭ la eblon kontroli la rapidecon de la progreso. Se oni laboras por ekzameno, oni sufiĉe frue informiĝu pri la

ekzamenaj postuloj, kaj atentu ilin dum la tuta studado.

Guste uzu vian tempon. Sukceson al via studado.

*K. Wilgenhof, Nederlando*

### Alvoko el Arnhem

Multaj samideanoj memoras la Esperantodomon, *Presikhaaf*, kie okazis la konataj Csehkursoj. La konstruaĵo bedaŭrinde jam perdis por la Esperanto-movado, ĉar tie oni nun intencas starigi teknikan lernejon. Tamen, kiel memoro pri la iama gloro, restas ankoraŭ la nomo de la aleo, kiu kondukis vizitantojn de la granda ŝose al la domo: *Esperanto-laan* (Esperanto-aleo). La tabulo, kiu portas la nomon difektigis dum la milito, kaj la Arnhemaj samideanoj deziras inaŭguri novan tabulon, kiu estos bonaspekta, kaj samtempe atentiga pri la ekzisto de nia afero.

Oni do invitas gesamideanojn el la tuta mondo fari donacojn por tiu celo. Eksterlandanoj povos pagi per respondkuponoj; Nederlandanoj per la ĝirkonto 239479 je nomo de P. Rosseel, Sleedoornlaan 31, Arnhem, Nederlando. Antaŭdankon al ĉiuj.

*Nome de la Arnhema Esperanto-Kunlaborkomitato, P. Rosseel*

### Internacia Instruista Kunlaborado

Post intertraktado inter diversaj landaj instruistfakoj, oni decidis starigi centran organizaĵon por provizora internacia kunlaborado. La organizaĵo portas la nomon *Internacia Instruista Kunlaborado* (I.I.K.). La komitato konsistas el F-ino V. C. Nixon (Anglujo), F-ino J. Dedieu (Francujo), S-ro P. Korte (Nederlando) kaj S-ro E. Dahl (Svedujo).

La komitato havas Centran Informejon, kiun gvidas S-ro E. Dahl, Uddevalla, Svedujo, kaj kiu kolektos informojn el ĉiuj landoj pri instruistaj, pedagogiaj kaj lernejaĵaj aferoj rilatantaj al Esperanto. La Centro ankaŭ disdonos taŭgajn informojn al la gazetaro, al landaj instruistaj organizaĵoj k.t.p. kaj respondos al demandoj pri lernejaĵoj, pri Esperanto kaj lernejo. Oni sendu respondkuponon kiam oni petas informon.

Oni esperas, ke geinstruistoj en ĉiuj landoj helpas en ĉi tiu provizora plano.

*Centra Informejo, E. Dahl*

# LA PETSKRIBO

La plej grava afero ĉe petskribo, kia la nia, estas kvanto; sed la fakto, ke en tiu kvanto troviĝas subskriboj de vere eminentaj homoj, estas faktoro kiun ni ne rajtas ignori; kontraŭe, ni devas alte taksi tiun simpatian por nia afero kaj uzi ĝin por instigi aliajn simile agi.

Ne estas oportune en la nuna tempo listigi la nomojn de ĉiuj eminentuloj, kiuj per sia subskribo apogas nian kampanjon, sed ni opinias, ke cito de kelkaj influhavaj nomoj ne nur donos al niaj kunlaborantoj novajn kuragon kaj fervoron, sed verŝajne indikos novan kampon sur kiu labori. La eblo citi la nomojn de ĉi tiuj gravuloj povos plifaciligi similan rikolton en aliaj rondoj.

Jen la nomoj de kelkaj subskribintoj, kies foliojn ni jam posedas en la Centra Oficejo:

- S-ro Vincent Aurioi, Prezidanto de la Franca Respubliko.
- Aŭstralio: S-ro P. J. Clarey, Ministro pri Laboro.
- Belgujo: S-ro Brun, Ĝenerala Sekr. de Radio Luksemburgo.
- Brazilo: S-ro A. Teixeira de Freitas, Ĉefo de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.
- Britujo: S-ro John Belcher, Parlaamenta Sekr. de la Komerca Ministerio.  
S-ro Freeman Wills Crofts, verkisto.  
S-ro Henry Holst, violonisto.  
S-ro Lionel Elwin, Estro Kolegio Ruskin, Oxford.
- Ĉeĥoslovakujo: Josef David, Prezidanto de Parlamento.  
Th. Dr. Josef Beran, Ĉefepiskopo de Praha.  
D-ro Josef Graň, Prez. de Internacia Asocio de Partizanoj.  
S-ro Bohumil Laušman, Ministro pri Industrio.  
S-ro Antonin Zápotocky, komunista deputito, estro de Inepolitika (Centra Sindikato).  
S-ro Zdeněk Fierlinger, vicprezidanto de Parlamento.
- Franco: Generalo De Rippert d'Alauzier, oficiro de la Honora Legio.  
S-ro Louis Croses, Vicprezidanto de la Akademio.
- Hungarujo: S-ro Ferenc Takács, Sekr. de Agrar-Ministerio, gvidanto de Soc.-Dem.-partio.  
S-ro Istvan Kossa, vicprezidanto de Parlamento, estrano de Komunista Partio.

D-ro Istvan Antos, vicministro de Financo.

D-ro Istvan Ries, Ministro pri Juro.

Islando: S-ro K. M. Nordanger, Guberniestro.

S-ro Helgi Eliasson, Estro de Instruado en Islando.

Kanado: Rt. Rev. Sir Francis Heathcote (Bart. D.D.), Episkopo de New Westminster, Vancouver.

S-ro Ian R. Burns, Prez. Komerca Telegrafa Unio de Ameriko.

Nederlando: S-ro W. Drees, Ministro pri Ekonomiaj aferoj.

Svisujo: D-ro h. c. F. von Ernst, Direktoro Internacia Unio de Telekomunikado.

Usono: S-ro Fred R. Zimmerman, Ŝtatssekretario.

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 10-a de Aprilo:—

## Landoj

|               |          |               |           |
|---------------|----------|---------------|-----------|
| Nederlando    | .. 46621 | Portugalujo   | .. 3322   |
| Britujo       | .. 22182 | Germanujo     | .. 3087   |
| Bulgarujo     | .. 21460 | Aŭstralio     | .. 2850   |
| Franco        | .. 20373 | Nov-Zelando   | .. 2495   |
| Svedujo       | .. 16515 | Italujo       | .. 2204   |
| Ĉeĥoslovakujo | .. 15821 | Egiptujo      | .. 1761   |
| Jugoslavujo   | .. 11740 | Svisujo       | .. 1269   |
| Norvegujo     | .. 11732 | Maroko        | .. 1018   |
| Danujo        | .. 7304  | Grekujo       | .. 473    |
| Aŭstrujo      | .. 6970  | Urugvajo      | .. 460    |
| Finnujo       | .. 6325  | Irlando       | .. 449    |
| Polujo        | .. 5590  | Palestino     | .. 445    |
| Argentino     | .. 5370  | Hispanujo     | .. 274    |
| Belgujo       | .. 5214  | Kanado        | .. 257    |
| Usono         | .. 4368  | Ceteraj lokoj | .. 593    |
| Brazilo       | .. 4129  |               |           |
| Islando       | .. 4065  | sume          | .. 240325 |
| Hungarujo     | .. 3589  |               |           |

## Okupoj

|                      |          |                |           |
|----------------------|----------|----------------|-----------|
| Artistoj             | .. 1424  | Navigaciistoj  | .. 853    |
| Delegitoj Komunumaj  | .. 370   | Parlamentanoj  | .. 134    |
| Dentistoj            | .. 383   | Polcistoj      | .. 1565   |
| Desegnistoj          | .. 1529  | Presistoj      | .. 2409   |
| Dommastrinoj         | .. 33396 | P.T.T.-istoj   | .. 5023   |
| Edukaj Aŭtoritatuloj | .. 924   | Religiistoj    | .. 1165   |
| Elektristoj          | .. 1962  | Sciencistoj    | .. 870    |
| Farmaciistoj         | .. 887   | Sindikateĉefoj | .. 324    |
| Farmistoj            | .. 7713  | Soldatoj       | .. 2725   |
| Hotelistoj           | .. 1176  | Studentoj      | .. 21502  |
| Inĝenieroj           | .. 9106  | Ŝoforoj        | .. 1678   |
| Instruistoj          | .. 13301 | Ŝtatoficistoj  | .. 5888   |
| Juristoj             | .. 1162  | Teknistoj      | .. 1095   |
| Ĵurnalistoj          | .. 839   | Transportistoj | .. 10916  |
| Komercestoj          | .. 41385 | Urboficistoj   | .. 2835   |
| Konstruistoj         | .. 4514  | Vendistoj      | .. 7201   |
| Kuracistoj           | .. 3234  | Vestistoj      | .. 4265   |
| Laboristoj           | .. 14952 | Diversaj       | .. 14034  |
| Lingvistoj           | .. 190   |                |           |
| Metiistoj Diversaj   | .. 17396 | sume           | .. 240325 |

# 32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, Svisujo. 26 Julio-2 Aŭgusto, 1947

Adreso por ĉiuj komunikadoj, Bundesgasse 20, Bern

## 7-a Listo de Kongresanoj

688. A. Paulsson, Ystad, Svedujo
689. S-ino M. L. Paulsson, Ystad, Svedujo
690. F-ino K. Waldén, Ystad, Svedujo
691. F-ino M.-A. Stücheli, Bern, Svislando
692. F-ino H. C. Davies, Bournemouth, Britujo
693. F-ino H. Gray, Glasgow, Britujo
694. J. Watson, Dunfermline, Britujo
695. F-ino D. M. Sudell, Morecambe, Britujo
696. G. Bevan, Wrexham, Britujo
697. F. Rayton, Blackburn, Britujo
698. S-ino M. A. Rayton, Blackburn, Britujo
699. J. Mayman, Blackburn, Britujo
700. S-ino B. Meredith, Birmingham, Britujo
701. S-ino Foley, Bolton, Britujo
702. C. A. Baker, Alphonington, Britujo
703. S-ino J. A. Martin, Stroud, Britujo
704. F-ino E. M. Whitehead, Bolton, Britujo
705. F-ino D. M. Goodby, Bolton, Britujo
706. F-ino F. Griffin, Portshead, Britujo
707. F-ino E. McInnes, Manchester, Britujo
708. S-ino R. Foulds, Matlock, Britujo
709. F-ino M. R. Dronfield, Matlock, Britujo
710. P. Schalmey, Hannover, Germanujo
711. T. Kutzli, St. Gallen, Svislando
712. F-ino M. I. M. Anderson, Norrköping, Svedujo
713. P. Hübner, Köln, Germanujo
714. A. De Maertelaere-Bentos, Gent, Belgujo
715. M. De Clercq, Gent, Belgujo
716. F-ino W. Johanson, Stockholm, Svedujo
717. Teodor Julin, Stockholm, Svedujo
718. S-ino Eva Julin, Stockholm, Svedujo
719. S. Nummelin, Stockholm, Svedujo
720. G. E. Munn, Sheffield, Britujo
721. F-ino D. B. Poppleton, Grimsby, Britujo
722. C. T. A. King, Sheffield, Britujo
723. F-ino F. Warren, Grimsby, Britujo
724. F-ino A. Bancroft, Blackburn, Britujo
725. W. H. Sheppard, Bristol, Britujo
726. G. Ó. Cléirigh, Dublin, Irlando
727. S. MacFeórais, Dublin, Irlando
728. F-ino H. Helme, Keighley, Britujo
729. S-ino C. Morris, Wigan, Britujo
730. F-ino A. Parr, Wigan, Britujo
731. F-ino Howarth, Wigan, Britujo
732. F-ino Kirkman, Wigan, Britujo
733. S-ino L. Atherton, Manchester, Britujo
734. J. Atherton, Manchester, Britujo
735. S-ino L. Townsley, Nelson, Britujo
736. K. I. Stephenson, Newcastle-on-Tyne, Britujo
737. S-ino O. Stephenson, Newcastle-on-Tyne, Britujo
738. F-ino E. Rogers, Southport, Britujo
739. F-ino I. S. M. Arnroth, Norrköping, Svedujo
740. B. Fogelberg, Stockholm, Svedujo
741. H. Herrmann, Lausanne, Svislando
742. V. Musella, Roma, Italujo
743. S-ino A. Musella, Roma, Italujo
744. S-ino E. Zisman, Trojan, Bulgario
745. Rezervita
746. F-ino M. Svensson, Ystad, Svedujo
747. N. J. B. Jönsson, Malmö, Svedujo
748. S-ino E. A. G.-B. Jönsson, Malmö, Svedujo
749. H. Christoffersson, Malmö, Svedujo
750. S-ino A. Christoffersson, Malmö, Svedujo
751. F-ino A. Andersson, Malmö, Svedujo
752. F-ino J. H. Blomqvist, Örebro, Svedujo

753. F-ino A. K. Hedlund, Änåset, Svedujo
754. F-ino K. E. J. Karlsson, Örebro, Svedujo
755. V. Karlsson, Lenhovda, Svedujo
756. W. Dahlén, Spånga, Svedujo
757. F-ino V. Hanson, Stockholm, Svedujo
758. S. A. Rydén, Lenhovda, Svedujo
759. F-ino A. U. E. Olsson, Göteborg, Svedujo
760. S. W. Ahlm, Stockholm, Svedujo
761. F-ino B. Holgers, Stockholm, Svedujo
762. Jan Strönné, Malmö, Svedujo
763. T. Sekelj, Buenos Aires, Argentino
764. L. Jönsson, Malmö, Svedujo
765. F-ino M. Larsson, Stockholm, Svedujo
766. F-ino D. V. M. Lindroth, Norrköping, Svedujo
767. F-ino M. Andersson, Malmö, Svedujo
768. A. R. Tancredi, Genova, Italujo
769. F-ino J. Tancredi, Genova, Italujo
770. L. Ó. Cuirc, Béal Átha an Fheadha, Irlando
771. E. H. Kersley, Plymouth, Britujo
772. S-ino D. I. Kersley, Plymouth, Britujo
773. F-ino E. W. Tegg, Ruislip, Britujo
774. F-ino I. Forber, St. Helens, Britujo
775. F-ino M. Downs, Wigan, Britujo
776. S-ino W. M. Rixham, Newcastle-on-Tyne, Britujo
777. F-ino C. Stephenson, Newcastle-on-Tyne, Britujo
778. K. W. Hickson, Swanage, Britujo
779. A. T. L. Hickson, Swanage, Britujo
780. S-ino V. Hickson, Swanage, Britujo
781. T. G. L. Hickson, Swanage, Britujo
782. H. Holden, Blackburn, Britujo
783. N. K. Crabtree, Heckmondwike, Britujo
784. F-ino A. Bolton, Nelson, Britujo
785. S. W. Brown, London, Britujo
786. G. A. Patton, Bangor, Norda Irlande
787. E. W. Moberly, Chipstead, Britujo
788. G. Orton, Durham City, Britujo
789. S-ino J. H. Thomas, Pretoria, Sud-Afriko
790. H. Thomas, Pretoria, Sud-Afriko
791. F-ino J. P. Davie, Prestwick, Britujo
792. F-ino L. C. Davie, Prestwick, Britujo
793. Atherton, Manchester, Britujo
794. F. F. Betts, Southend-on-Sea, Britujo
795. A. Vila Maynon, Buenos Aires, Argentino
796. F-ino G. Weigelt, Bern, Svislando
797. F-ino I. Lövgren, Norrköping, Svedujo
798. F-ino Eva Tibbling, Norrköping, Svedujo
799. F-ino R. Gullberg, Grycksbo, Svedujo
800. Sven E.-son Sten, Uppsala, Svedujo
801. E. Eriksson, Uppsala, Svedujo


## Kongresanoj (analizo)

| Lando:        | Enskribitaj: | Lando:        | Enskribitaj: |
|---------------|--------------|---------------|--------------|
| Argentino     | .. 2         | Norda Irlando | .. 2         |
| Aŭstralio     | .. 2         | Islando       | .. 27        |
| Aŭstrujo      | .. 1         | Italujo       | .. 8         |
| Belgujo       | .. 20        | Jugoslavujo   | .. 8         |
| Brazilo       | .. 4         | Nederlando    | .. 6         |
| Britujo       | .. 493       | Norvegujo     | .. 2         |
| Bulgario      | .. 2         | Portugalujo   | .. 3         |
| Ĉeĥoslovakujo | .. 7         | Svedujo       | .. 80        |
| Danujo        | .. 2         | Svislando     | .. 106       |
| Finnujo       | .. 2         | Sud-Afriko    | .. 2         |
| Francujo      | .. 10        | Usono         | .. 6         |
| Germanujo     | .. 5         |               |              |
| Irlando       | .. 6         | sumo          | .. 806       |

# ESPERANTO KAJ RADIO

|          |                |                                 |                                                                                                                                     |
|----------|----------------|---------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| Ĉiutage  | 15.30–15.45    | Praha (Ĉeĥoslovakujo).          | 19.35m. kaj 31.41m.                                                                                                                 |
|          | 21.00–21.15    | Praha (Ĉeĥoslovakujo).          | 49.92m.                                                                                                                             |
| Lundo    | 11.30–11.40    | PRG2 (Brazilo).                 | 104m. Poresperanta parolado.                                                                                                        |
|          | 20.50–21.00    | Praha.                          | 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.  |
| Mardo    | 18.50–19.00    | Sofia (Bulgarujo).              | 32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.                                                                                                       |
|          | 21.50–22.00    | Ostrava (Ĉeĥoslovakujo).        | 325.4m. Informoj. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.                                                                                  |
| Merkredo | 5.35–5.45      | Wien I (Aŭstrujo).              | 506.8m. Esperanto-kurso. RAVAG-Wien, 30a Argentinierstr., Wien IV.                                                                  |
|          | 10.15–10.35    | Paris (Francujo).               | 431.7m. Esperanto-kurso.                                                                                                            |
|          | 21.10–21.25    | Warszawa III (Polujo).          | 49.06m. Informoj. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.                                                                                |
| Ĵaŭdo    | 16.50–16.55    | Wien II (Aŭstrujo).             | 31m., 41m. kaj 228.6m. Informservo. RAVAG-Wien.                                                                                     |
|          | 17.55          | Bern (Svisujo).                 | 47.28m. (ankaŭ 200m. proks. laŭ raportoj). Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat. Societo Svisa de Radio-dissendo, Bern. |
|          | 18.45–19.00    | Hradec Králové (Ĉeĥoslovakujo). | 280m. Esperanto-programo. Vychodočeky vysílač. Hradec Králové.                                                                      |
|          | 20.50–21.00    | Praha.                          | 470.2m. (kiel je lundo).                                                                                                            |
| Vendredo | 18.10–18.20(?) | B.N.R.O., Brussel (Belgujo).    | 321.9m. Kurso. N.I.R., Esperanto-kursus, Eug. Flageyplein, Elsene-Brussel.                                                          |
|          | 18.50–19.00    | Sofia (Bulgarujo).              | 32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.                                                                                                       |
|          | 21.50–22.00    | Ostrava.                        | 325.4m. (kiel je mardo).                                                                                                            |
| Sabato   | 15.10–15.25    | Hilversum (Nederlando).         | 301m. Parolado. Nur je la 7a Junio kaj 5a Julio.                                                                                    |
|          | 19.00–19.45(?) | PRA 2 (Brazilo).                | Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.                                     |
|          | 20.00–20.30    | PRI 3 (Brazilo).                | 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.                           |

**Klarigoj**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni urĝe petas informon pri necesaj aliĝoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevado.



Bern.—La urbdomo konstruita en 1406

Ni ricevis la *Nederlandan Numeron de La Interligilo*, organo de I.L.E.P.T.T. Kiel kutime, ĉi tiu fakgazeto estas plena de valora informo por la koncernaj fakuloj.

Ni estas kontentaj raportiti la daŭran aperon de *Komunikoj*, monata informilo de la Kolektivo de Germanaj Esperanto-Organizoj (K.G.E.O.)

## Pri la Fotografarto

S-ro Homer R. Hansen, 92 Cannon St., New York 2, N.Y., Usono, atentigas, ke mankas en Esperanto *Terminaro pri Fotografio*, kaj tial petas, ke fakuloj sin turnu al li kun celo organizi la kolektadon de informoj. Oni poste povos decidi pri kompilo de tia terminaro.

# RECENZOJ

\*=akireblaj ĉe I.E.L.



## \*Antonio kaj Kleopatro : de

W. Shakespeare : el Angla lingvo trad. S. A. Andrew : eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. 18×12.5 cm., 90 p. broŝ., prezo 2 ŝil. 6 pencoj plus 2p. afranko aŭ 11 respondkuponoj afrankinkluzive.

Por ĝuste taksu la lertecon de ĉi tiu traduko, tiu kiu posedas la Anglan lingvon, legu la tragedion laŭ la originalo, kaj ĝin komparu kun la traduko de S-ro Andrew. La unua nepra rezulto estos, ke la leganto ekkonstatos, ke la Esperanta teksto estas tre perceptebla pli klareprima, ol la Angla.

Estus troigo pretendi, ke kiu ajn traduko egalas la devenlingvan (des pli, kiam temas pri Shakespeare). Sed, tion konfesinte, oni ne povas ne elkore admiru la lertecon de la tradukinto, kaj konsenti, ke li saĝe agis, elektante tutprozan formon.

Kompreneble, prosperas ĉiam al pedantulo fari kelkajn marginajn krazonaĵojn pri anstataŭaj vortoj, esprimoj, aŭ frazoj. Sed tiuj estus, rilate al ĉi tiu traduko, nur bagateloj, kaj grandmezure aferoj de individua prefero, kaj tial ne menciindaj. Harfendemulo legu ankaŭ en la antaŭparolo : “Mi ne volas sugesti, ke estas neeble esperantigi . . . laŭ . . . versformoj . . . per tio malpliigante facilan kompreneblecon.” Ĉi tiu traduko, klara kaj flumova, tamen retenas laŭ mirinda grado la esencan spiriton de la originalo.

Bedaŭrinde, tradukoj tro ofte meritas kritikon se ne mallaŭdon. Des pli plaĉe estas, senhezite povi rekomendi ĉi tiun libreton.

N.H.C.M.

**Misisipi :** teatraĵo en tri aktoj, de L. Malaf : el Juda lingvo trad. I. Jurysta. Eld. Juda Esp. Grupo en Parizo. 21×13.5 cm. 64p. broŝ. 100 fr.

Kiel ofte ĉe familioj, tiel ankaŭ ĉe popoloj kaj ŝtatoj ekzistas niĉoj, kien oni ne volonte lasas penetri, kaj pri kiu oni prefere volas forgesi, ĉar tie sin trovas aferoj abomenaj, ŝokaj kaj teruraj. En la historio de ĉiuj grandnacioj okazis epizodoj, kiuj siatempe ŝokis la eksteran mondon kaj elvokis ĝian moralan kondamnon. Tiel estis pri la afero de Scottsboro. Povas esti, ke la longa serio de teruraĵoj, kruelaĵoj kaj ĉiuspecaj turmentoj de la pasinta jardeko en Eŭropo kaŭzis, ke la homoj jam ne kapablas senti abomenon pri unuopa maljustaĵo ; sed, malgraŭ ke la malbonfama Scottsboro-afero jam estas historia okazintaĵo, la faktoroj kiuj kontribuis al tiu oficiala mortigo de sep Usonaj negroj—unu nur 13-jara—pro laŭdira seksatenco kontraŭ du

prostituitinoj, ankoraŭ ekzistas kaj ne povas ne vekti senton de forta indigno en la koro de ĉiu homarano. Ĉar tiuj faktoroj konsistigas konstantan minacon kontraŭ la nigrula loĝantaro de Usono, estas bone, ke ĉi tia memorigilo aperis.

Per ĉi tiu teatraĵo L. Malaf plene ekspluatas la situacion. Liaj priskriboj, ĉu de scenoj, ĉu de personoj, estas fidindaj. Li ŝiras la falsan maskon for de la vero kaj prezentas al ni la rasmalamon en ĝia tuta kruda realo. La leganto mem devas decidi, ĉu lia konkludo, ke la kerno de la afero estas politika, sed ne rasa, estas vera aŭ ne.

Pri la traduko mi povus skribi multon. Malgraŭ—eĉ spite de—la multaj malbonaĵoj, la genio de la originalo persistas, sed la tradukinto kaj la eldonistoj miaopinie montris grandan malrespekton al la memoro de la mortinta aŭtoro, prezentinte lian verkon ĉi tia.

Troviĝas multaj nebonaj formoj kaj gramatikaj eraroj, kaj neniel defendeblaj estas vortoj kiaj *ekskuzo* (senkulpig, pardon), *skvero* (placo), *tekstil* (teksaĵ) kaj *descendi* (deiri). La vera signifo de pluraj radikoj evitis la tradukinton, ekz. *kompanio* (kunesto, kunularo) p. 17, 19, *popolo* (homoj) p. 24, 25, 50, *ĝemsoŝpir* (ĝemspir) p. 26, 29, *ideo* (penso) 0. 29, 31, *simpatio* (konsento) p. 12.

Oni rajtas demandi, ankoraŭ kiom da tempo la Esperanta popolo devos toleri ĉi tiajn verkojn fare de homoj, al kiuj ŝajne mankas ŝato pri stila beleco kaj sento de vera respekto al la aŭtoroj kies verkojn ili misprezentas. Jen verko, kiu antaŭ ĉio meritis idan traktadon.

Papero kaj preso bonaj, kaj alestas fotografajao de la aŭtoro.

Mason Stuttard

**Pri la Esenco de la Nederlanda Kooperativa Ĝiro-Kredit-Ringo :** 36-paĝa hektografita broŝuro : prezo ne montrita. Eld. N.-K.-Ĝ.-Ringo, Den Haag, Nederlando.

La temo de ĉi tiu propaganda broŝuro estas simpla—la mونسistemo estas uilega en la servo de la homaro, sed mono povas esti “la radikoj de ĉiuj malbonfaroj” se ĝi troviĝas en netaŭgaj manoj (ekz. de monopolisto aŭ financisto). Tial oni formu kooperativajn *ringojn* de honestuloj, kaj ĉiu membro elspezu sian monon (aŭ kiel eble plej multe da ĝi) nur inter la membraro pere de la centra ĝiro-kredit-instituto.

Laŭdinda ideo, sed nur ĝisgrade praktikebla kaj efika en la moderna mondo.

La lingvaĵo estas tre peza kaj iufoje malfacile komprenebla, kaj preseraroj abundas. Kredeble la originalo estis en ia imponvorta, duonideala, duonkomerca, Nederlanda lingvoformo, kaj oni tro laŭlitere tradukis ĝin Esperanten.

W. A. Gething

Georges Agricola :

# LA LUZICA POPOLO

*Ho Luzicio, senripoze  
Laboros mi por via celo,  
Por vi, fiero mia sola,  
Vi, fontofonto, mia stelo.*

La detruo de la TRIA REGNO, post sesjara militado elvokis senton de kontentigo ĉe la interesitaj popoloj. La minaca glavo estis frakasita, pli libere spiras la homaro. La giganteco de la finita batalo nebuligis tre gravan fakton de la eŭropa historio : nome la repuŝon de la germana aspiro je l'oriento, tiu ĉi fenomeno konata sub la slogano DRANG NACH OSTEN, la aspiro, germanecigi la orientan parton de Eŭropo. La nuna venko de la liberecaj popoloj kaj specife de la rusoj nuligis la koloniigadon teŭtan kaj germanan de preskaŭ unu jarmilo, komenciĝanta sub Karlo la Granda kaj finiĝinta sub Hitler. Tiu ĉi miljara militado, kondukata sub variaj formoj kaj pretekstoj ja neniam haltis ; unu pretendis ke temas pri kristanigo de l'slavaj idolanoj, la alia pri la konkero de l'nepre necesa *vivspaco*, la dua slogano en la repertuaro, la LEBENSRAUM por 250 milionoj da germanoj post unu jarcento.

Tiu ĉi kunpuŝigo de l'slavoj kaj teŭtoj estas en si mem la eterna ripetado de l'tragedio homa, tiel kiel la Biblio simbole ĝin priskribis en la rivaleco de la fratoj Kain kaj Abel. Ĝi estas la batalo de la bruteca instinkto de l'homo kun sia pli bona MEM'o, tute egale ĉu ĝi estas pravigata per konvertigo al supera ideo dieca aŭ per la pli konkreta postulo gajni teron aŭ vivspacon.

Se oni parolas pri la panslavismo t.e. la movado por kunigi ĉiujn slavojn, oni ĝenerale pensas nur pri *rusoj*. Nur dum kaj post la unua milito (1914-1918) pli vasta publiko sciigis pri aliaj slavaj gentoj, batalintaj por ŝtata sendependeco. La kompreno pri okcidentoslavoj kaj sudoslavoj (súdo=jugo) iĝis neta kaj la energio per kiuj la ĉefoj kaj slovakoj, la serboj, kroatoj kaj slovenoj, fine la poloj kaj ukrainanoj diskonigis siajn aspirojn, fortiris la kurtenon antaŭ iliaj okuloj. La slavoj fariĝis faktoro en la tutmonda politiko, dank'al tiu ĉi impulso de regajnitita libero kaj al kelkaj distingaj figuroj ; ni pensu nur al Masaryk, Beneš, Paderewski, Piłsudski, Pašić kaj aliaj.

La nunaj limoj de l'vivspaco slava de nord-okcidento ĝis sudo de Eŭropo estas pli malpli konataj. Ke ĉi tiuj limoj estas la resto de plej sangaj amputacioj estas malpli konata. Kaj efektive la vivspaco slava etendiĝis iam sur teritorioj germanigitaj antaŭ pli ol mil jaroj jam, nuna Meklenburgo, parto de Turingio, tuta

Saksio kaj tiel plu. La iaman slavecon pravas io, kio postrestis kiel fosilio : la loknomoj ! Atenta observanto facile konstatas, ke nomoj kiel Rostock, Berlin, Potsdam, Leipzig, Chemnitz, por nur citi konatajn lokojn, *ne* estas german-radikaj, same kiel miloj ceteraj en ĉi tiuj landoj, entute germanaj hodiaŭ. Ĉi tiuj landoj estis iam slavaj, loĝitaj de gentoj "estingitaj", kvankam ne malmultaj el la nunaj loĝantoj germanaj havas la tipajn karakterizaĵojn de l'ama slava pra-loĝanto. Ja eĉ multaj familiaj nomoj memorigas tiun ĉi slavan originon.

Post tiu ĉi necesa eniro ni venu al la kerno de l'afero, nome la "popolo forgesita", la luzicio.


## Slava gento kiu ne volas malaperi

En la centro de l'Reich, ja antaŭ la pordoj de Berlino kaj en Saksio vivas ankoraŭ slava gento, kiu ne volas morti, kiu forte postulas, ke oni respektu sian vivrajton, sian rajton decidi propran sorton. Tie ĉi en la fama Spreva Arbaro (Spreewald) en la regionoj de Luzicio, supra kaj malsupra, vivas la restoj de l'slava loĝantaro. Estas la luzicaj serboj, nomataj de germanoj, *Wenden* t.e. venedoj, kelkfoje ankaŭ sorboj. Citante la radikon *vened'* oni eklevas vualon de forgeso pri nigra makulo en la libro de l'homara historio. Ĝi estas la metoda ekstermo de la slava gentaro en la pasinto. Kiel jam dirite, venedoj, germane *Wenden*, estis la nomo donita de la teŭtoj al la slavoj ĝenerale. Multaj loknomoj, de la legenda *Vineto*, la urbo sub-akviginta en la Balta Maro ĝis Venecio en la sudo, oni renkontas tiun ĉi popolnomon ; ĝi retroviĝas en *Windisch* kaj en Windischgrätz, en Vindibona kiel en Augusta Vindelicorum.

La nomoj de l'serboj, sub kiuj ni nun komprenas la serbojn sur Balkano, estas la alia ĝenerala nomo uzitaj de la teŭtoj por la slavoj, kiel pruvis ĝi la eminenta slavisto Saferk.

Ankoraŭ je la fino de l' 19-a jarcento oni povis vidi en Berlino, virinojn, vestitajn en koloraj kostumoj naciaj, promenigante infanojn. Estis serbaj infan-nutristinoj de sana raso kaj estis bontona ĉe riĉaj familioj berlinaj dungi tian virinon la "wendische Amme".

La pangermanismo, kompare al la NAZI-socialismo, milda en la programo de la kompleta ekstermo de l'slavoj, ne multe okupigis pri la



luzicaj serboj. Ĝi koncentrigis sian tutan energion al la senpoliigo (Entpolisierung) de l'orientaj provincoj, precipe de Poznan (Posen) kaj de Supra Silezio. La periodo de tiu ĉi batalo estis nomita laŭ la tri *MANN*, Hansemann, Kennemann kaj Tiedemann, la HA-KA-TI-stoj, kiuj per ĉiuj rimedoj serĉis germanigigi la teron kaj la loĝantaron. La germana metodeco superbordigis en la trovo de ĉiam novaj ebloj atingi la celon. Tiu ĉi ekskluziveco laŭ la formulo "unu regno unu popolo, unu dio", influis la sintenon oficialan rilate al la slava insulo en la

germana popolmaro. Silente kaj decide la germanecigo antaŭeniris. Se je la mezo de l'pasinta jarcento, la nombro de nur slave parolantaj loĝantoj estis plimulto, tiam jam en jaro 1900, la dulingveco estis ĝenerala kun videbla tendenco, ke la serba idiomu malaperas iom post iom. La kaŭzoj de tiu ĉi "malvarma" mortigo estis la reduktado de l'instruado en serba lingvo ĝis nura katekismo-ripetado, la fakta neebleco presigi librojn kaj periodaĵojn, la deviga militservo kiu konstante kontaktigis la serban junularon kun germanparolantoj, plie la etendiginta industrialigo, forloginta energiajn elementojn al centroj industriaj en cetera Germanujo, kie ili germanigis sen granda premo. Alia pli psika faktoro, estis ia komplekso de infioreco, kiun la simplanima kamparano suferas, estante en kontakto kun la "civilizita" urbano. Senespele la defendantoj de l'slava popoleco batalis kontraŭ tiu ĉi sennaciigo. La verkinto de tiu ĉi artikolo konatigis kun la administraj metodoj uzitaj kontraŭ la slavaj popoloj. Estis en la universitata urbo Heidelberg, kie li konatigis kun luzica serbo, ĝarden-kulturisto, inteligenta viro, kiu informis lin pri la sorto de sia popolo. Lia nomo estis Friedrich Wilhelm. Demandinte lin, kial li havas germanan nomon kaj eĉ ne aŭtentikan famili-nomon, li klarigis, ke lian veran nomon *SORE* oni simple forstrekis administre, uzante la duan antaŭnomon (Wilhelm) kiel familian! Genia procedo, per simpla administra fraŭdo, solvi la problemon de etna malplimulto.

Se en la prusa parto de Luzicio, la sennaciigo iris rapide, tiam en la saksa ĝi estis male. Dum la monarkia tempo la venedoj ekzistis eĉ oficiale en la titolo de la saksa reĝo: "NI . . . per la graco de Dio, reĝo de l'saksoj, gotoj kaj venedoj" . . . estis la komenco de la reĝa proklamacio. Bautzen, tiu ĉi iom strangsona urbino por la serba Budyšin, konservis la lastan formon ĝis

iom antaŭ la fino de la jaro 1900. Pro la relative malgranda nombro (temas pri kelkcentmil kaj ne kelkmilionoj !), la foresto de ĉia propagando eksterlanda kaj laste pro la geografia situo meze de Germanujo, la serboj laŭvide estis kondamnitaj al etna pereco. Aparte kelkaj folkloristoj kaj lingvistoj, nenia speciala intereso favore je ili montriĝis en aliaj landoj, escepte la gimnasta SOKOL-movado, ĉe kiu en normala tempo, antaŭ 1914 povis partopreni junuloj, ne timantaj ĉikanon poste, pro vizito de Sokolkunveno en eksterlando.

La unua provo reguligi la ŝtatjuran pozicion de la luzicaj serboj, okazis en 1919, kiam delegacio luzica al la Pariza Pac-Konferenco vane volis vekigi tutmondan konsciencon. La rajto de la minoritatoj, destinita por protekti etnajn malplimultojn, fariĝis en la apliko vera farso. Ĝi neniel influis la sorton de tiu ĉi forgesita gento, lojalaj civitanoj prusaj kaj saksaj. La respublika reĝimo en Germanujo havis bonan intencon por multaj modernaj postuloj, sed la efektivigon sabotis plejofte la burokrataro, kie regis la malnova ekipo. Kaj en la speciala kazo de la slavaj malplimultoj, pola kaj serba, venkis malnova antagonismo. Eĉ alte pensantaj noblaj germanoj ne kapablis liberiĝi de l'ideo, ke la slava loĝanto estas inferiora kaj devus danki dion, fariĝi centprocenta germano.

### La solvo de la problemo

Hodiaŭ la momento aperas favora, liberiĝi de miljara jugo kaj doni formon al la aspiroj de la serba popolo en Luzicio. Estas du eblecoj: Aliĝi kiel aŭtonomia teritorio al plej proksima najbaro, la ĉeĥa, aŭ resti en la kadro de la germana regno kun rajtoj de aŭtoŝtona loĝanto, kiu mem decidus sian sorton. La spertoj faritaj kun la tielnomita "politiko de minoritatoj" ja ne kuraĝigas refari ion pri kio ĉiuj konsentas, ke estis fiasko. Ekzamenante la du eblecojn, ambaŭ ne akordigeblajn oni vidas, ke la unua solvo radikala estas inversigo de la Nazi-postulo "Heim ins Reich", dume la dua ebleco, sen fundamenta ŝanĝo de l'germana sinteno kontraŭ la slavo ne solvos la problemon. La amputacio de teritorioj germanaj kun aŭ sen la germanaj loĝantoj, sublevas ree problemojn tiom gravajn, ke la packonferenco, kiu fiksos la kondiĉojn por la estonta germana regno, ne havos facilan laboron.

Estas versimile ke la Grandpotencoj ne sankcios plian amputacion teritorian de Germanujo. Kio do povus esti la solvo de la ora mezo?

Estas ideo sufiĉe radikala. Nome, taŭga solvo devus esti la ekzemplo svisa kun la retoromanĉoj, loĝantoj de l'kantono de la Griza Ligo (Les Grisons, Graubünden). En tiu ĉi parto de la Svisa Konfederacio vivas pace la retoromanĉoj

kun itallingvaj kaj germanlingvaj svisoj, Interne de la kantono la romanĉa lingvo estas *oficiala*; por la Konfederacio ĝi estas *nacia* lingvo sub la protekto de la konstitucio svisa.

Sed tio ne estas la ĉefaĵo. La baza elemento por la ekzisto etna de ĉi tiuj 40000 retoromanĉoj estas la . . . libereco komunuma. Tiu ĉi ĉelo, la komunumo, decidus siajn aferojn laŭ la volo de la loĝantoj, Akordante tiun ĉi primitivan rajton al ĉiuj en Germanujo la plia solvo en la speciala kazo de la luzicaj serboj, estus la perkonstitucia garantiigo de l'rajtoj de l' homo kaj de la nacia aŭ lingva malplimulto, decidi en la kadro de la propra vivspaco pri siaj aferoj. Tiu ĉi fikso de fundamenta rajto en konstitucio povus servi kiel modelo por similaj situacioj en aliaj regnoj, kie etna malplimulto batalas pro vivrajto.

Jen ebleco, eble utopia hodiaŭ, rebonigi maljustaĵon miljaran. Estas la tasko de la estonta packonferenco decidi. Dume la defendantoj de l'*popolo kiu ne volas morti* entreprenas la kolosan taskon informi la mondon pri ĝi, pri ĝiaj aspiroj kaj pri ĝiaj esperoj.

Finante tiun ĉi priskribon, ni metu la deziron de l'luzicano, esprimitan en la poeziaĵo de Bart-Cižinski (Al Luzicio):

Mi vin glorigos, kaj se fine  
Mi falos, arbofolieto,  
Vi tiam sub luzican herbon  
Min metu por etern' kvieto.

### Kelkaj detaloj pri la Luzicio

*Surfaco*: 12.291 kv. km. *Loĝantaro*: ĉirkaŭ 900000. *Nombro de komunumoj*: 1424. *Gravaj lokoj*: Görlitz-Zhorjela, 92000 loĝantoj, Kottbus-Khočebuz 53000 loĝantoj, Bautzen-Budyšin 40000 loĝantoj, laŭ germanaj indikoj. La unua dokumento en la luzica lingvo estas la Nova Testamento, tradukita kaj presita en jaro 1548 kaj la unua gramatiko aperis en 1650 por latinanoj; la unua presita gramatiko kompilita de jezuito Ticine "Principia linguae vendicæ" (1679).

Specimena teksto de la lingvo (Patro Nia, en super-luzicia formo):

Wótče naš, kiž sy w njebiesach, swjećene budž twoje mjeno, prindž k nam twoje kralestwo, twoja wola so stan, jako na njebru, tak tež na zemi. Naš wšědny khleb daj nam džens a wodaj nam naše winy, jako tež my wodawamy našim winikam, a njewdjedž nas do spytowanja, ale wumož nas wot zleho. Pretož twoje je kralestwo a mč a česć hač do wěčnosće. Hamjen.

Amikoj de la homrajtoj kaj por la libereco eĉ de la malgrandaj popoloj, kiuj bonvolas traduki supran artikolon en nacian lingvon kaj transdoni ĝin al gazetaro, estas petataj sendi specimenojn de la aperinta artikolo al: O. Ginz, Stráková 14, Praha II, Ĉ.S.R.

## PSIKOLOGIA PUNKTO

La fama Angla poeto, Alexander Pope, frue en la dekokaj jarcento elmontris eksterordinaran penetremon, kaj en liaj poemoj oni povas trovi multajn asertojn pri homa agado, kies verecon akceptis psikologoj nur post preskaŭ ducent jaroj, kiam fondiĝis la nova skolo de psikologio.

Unu el tiuj asertoj havas tre gravan rilaton al nuntempaj homaferoj. Li kelkfoje esprimis la ideon, sed en la *Essay on Man* (Eseo pri la Homo) ĝi montriĝas en tre simplaj, trafaj vortoj jene: *Reason the card, but Passion is the gale* (Racio la kompas, sed Deziro estas la ventego). La moderna psikologio antaŭ kelke da jaroj firme konstatis tiun fakton, ke la sola fonto de energio en la homo troviĝas en la emocio, kaj ke la racio funkcias nur kiel gvidilo.

Malgraŭ ke psikologo konsentus tiun aserton, li kredeble ne povas senti ĝian verecon rilate siajn proprajn agojn; sian konvinkon li ne atingis per introspekto sed per rezonado pri observajoj. Konsiderante tiun temon, oni devus ĉiam memori, ke ĉi tiu ideo rekte kontraŭas iluzion, kiun la plimulto drolotas, kaj laŭko kompreneble kutime forĵetas ĝin kiel mem-evidente absurda—kaj preskaŭ ĉiam povas doni kialojn por pravigi sian agadon. Estas tre malfacile konvinki lin, ke la emocio pelas lin al ago, kaj ke li uzas la racion nur por elfosi kialojn, kiuj pravigos la deziritan agon.

Nu, kial gravas ĉi tio en la nuna tempo? Tial ke la plimulto de la homoj, ne rekonante la efektivan rilaton inter la emocio kaj la racio, vane serĉas en malĝustaj lokoj rimedojn kontraŭ monda malpaco. Nek la racio, nek manko de ĝi estas treninta nin ĝis la nuna terurega situacio. La emocio ja estas la sola kulpulo. La problemo de sekura vivo, pli komforta ol iu ajn konjektita, estas malpli malfacila ol multaj solvitaj dum la milito; niaj cerboj povus prizorgi tion kun aplombo. Kio mankas, estas la volo.

Mi bone komprenas, ke ĉio tio ĉi malakordas kun rutinaj ideoj, kaj mi facile povas imagi la koleran rifuzon, kiun tiaj asertoj renkontos ĉe la plimulto. "La popoloj ne volas batali kontraŭ aliaj! La kaŭzoj de milito estas... (laŭplaĉe)". Mi konsentas, ke la popoloj ne deziras militon; sed kion ili faras por malhelpi ĝin? Preskaŭ ĉiu rimedo farita aŭ proponita koncentriĝas en planado, sed en tiu cerbago ne fontos savo.

Povas esti, ke Angloj elmontras al fremduloj pli fieracan sintenon ol iuj ajn aliaj nacioj, kaj estas certe, ke en Anglujo mi oftege aŭdas esprimojn, kiuj evidentigas tian mankon de

simpatio al fremduloj, ĉu malamikaj ĉu aliancanaj, kia tre certe malebligas mondpacon. Zamenhof, eĉ kiam li estis nur junulo, konstatis ke batalemo fontas el manko de kompreno; kaj tiu kompreno ne estas nur per la cerbo, sed ja per la koro.

Estas nepre atendeble, kaj samtempe dezirinde, ke homoj el malsimilaj ĉirkaŭaĵoj prezentas diversajn modojn de penso kaj sinteno; kaj ju pli la homoj malsimilas, des pli ni devus turni la atenton for de la elstaraj punktoj de malsimileco, sed kontraŭe atenti la malpli trudan sed pli ampleksan homan similecon. Se tio ŝajnas al leganto facila aŭ negrava, li zorge konsideru sian propran, instinktan reagon antaŭ homo kun alia haŭtkoloro; li konstatu, ĉu aŭ ne tiu malgrava eksteraĵo reliefigas pli ol la multe pli grava fakto de ties homeco.

Tiuj kiuj taksas sin kiel bonvolajn homojn devus strikte dresi sin por *senti* amikeme al ĉiuj aliaj, kaj kiam ili tiel sentas, ili elserĉu rimedojn por esprimi la senton per agado.

Por tiu treege necesa ekzercado la raso estas malbone ekipita. De la tempo de Plato ĉiu formo de edukado estas preskaŭ ekskluzive cerba. Efektive, la pligranda parto de la malfeliĉo en la mondo fontas el tiu malproportia atento per kiu la cerba kaj la kora partoj estas flegitaj. Esperantistoj, laŭ mia sperto, pli facile ol la ceteraj homoj povos konscie elvolvi amikecajn sentojn, sed ilia devo ne ĉesas tie. Ĉiu kiu rekonas la superegan gravecon de ĉio tio ĉi, devus instigi aliajn, per vortoj, ekzemplo, aŭ iel ajn, al tia sama esplorado de propraj emocioj; ili devus fariĝi perantoj de la homaranismo.

T. K. Slade, Anglujo

### La Leganto Parolas

S-ro R. F. Latimer skribas: Rilate la artikolon sur p.38 de la Marta numero (*Esperanto ĉe Maristoj*) mi tute konsentas. Vizitante Port Said, mi certe sencele ĉirkaŭmarŝus se mi ne havus la I.E.L.-an Jarlibron. Sufiĉas diri, ke mi tute ĝuis viziton al urbo, kiu estas konata inter la maristaro kiel *diboĉejo*... Jen plendo. Nur malofte oni vidas eĉ la nomon Esperanto. Mi sugestas, ke lokaj Esperantistoj en ĉiu havenurbo reklamu Esperanton en ĉiu Y.M.C.A., Y.W.C.A., militista klubo, manĝejo kaj biblioteko, kaj anoncu la adreson de la grupo per aŝiso.

# ENIGMA KONKURSO N-ro 15

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo

## Solvoj de la enigmoj en Konkursu N-ro 13

**N-ro 29 :** Mankas klapo en lia kapo. Ŝlosilvortoj : kampo, opalo, linko, stako, omaro, mosko, forko, silko, etaĝo, talpo, orelo, mielo, lorno, ŝalmo, liuto, okazo, tinko, ardeo, lampo, ikono.

**N-ro 30 :** Pri havo najbara oni estas malavara. Ŝlosilvortoj : portulako, reformacio, inspektoro, hospitalo, artiŝoko, virtuoza, ornitologio, nostalgio, astrologio, juĝisto, brokantisto, antipodo, redaktoro, antologio, orkideo, nepotismo, inokuli, ekvatoro, sortimento, trotuaro, apotekisto, stenografio, marokeno, artikolo, leopardo, amuleto, velocipedo, aeroplano, romantiko, atmosfero.

**N-ro 31 :** Se 1 estus vera, ankaŭ 2 estus vera, do 1 estas nevera. El tio sekvas, ke se 2 estus vera, C havus tenoron, sed tiam 3 estus vera ; do ankaŭ 2 estas nevera. 3 do nepre estas vera kaj 1 kaj 2 estas neveraj. El tio sekvas, ke B havas tenoron, A havas bason kaj C havas baritonon.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la dekuŭua konkurso : F-ino M. J. Top (Belg.) 81 p., S-ro S. Roelofsen (Ned.) 73,5 p., S-ro L. Staal (Ned.) 73 p., post lotumo. Sekvas post ili : F-ino W. M. Millenaar 73 p., F-ino N. Hanson 68 p., S-ro F. Taylor 66 p., F-ino E. Jayet 65 p., S-ro P. Brunet 65 p., S-ro P. E. Schwerin 64 p., S-ro R. V. Salles 60 p., S-ro W. Manders 60 p., S-ro H. Hasper, S-ro A. E. Rosengaard-Hansen kaj S-ro D. W. Robson 59 p.

## Enigmo N-ro 35 : Karaj Geamikoj,

Ĉar 19-66 spaco, 56-68-18 kiu mi rajtas disponi 10-120-92-62-114 limigita, mi per ĉi tiu sciigo 17-59-49-78-14 doni 48-38 vi kelkajn 6-74-67-50-83-33-111-27-58. Ĝis nun atingis min 125-113-118-95-89-63 de 36-42-124-1128-3 personoj el dudek du diversaj landoj. Mi 128-93 88-72-47-7-13 esti kontenta, 11-30 ne en 49-117 lasta tempo kelkaj el vi ŝajnis 40-90-110-99-84 la kuraĝon. 16-55 praktiko 77-109-25 pruvis, ke la gajnintoj atingis certan poentnombron, kiu 92-48-79-10-28 por ĉiu 53-26-75-17-69-22-85-129 estas atingebla. Eĉ de tiuj, kiuj ne regule ensendas, aŭ de 1-98-105-46, 61-2-37-87 91-123 sukcesas solvi 9-12-105-108-127 enigmojn tute 71-45-41-21-81-121-126, la poentnombro tamen kreskas, 71-100-73-44-122-43 ankaŭ ili certe estos inter la tri 24-20-4-70-39-106-115-32-8. 102-34-60-90-51-119-116-57 mi donas 31-47-23-35 poentojn 112-15-29 ĉiu tute korekta solvo.

Tio ebligas, ke solvojn, 5-103-107-94 ne estas tute korektaj, mi povas rekompenci per kvar, tri aŭ malpli da poentoj laŭ 97-65 grado de 54-86 korekteco. La konkkludon, kiu 104-21-31-95-80-101 el ĉi tiu sciigo, vi legos, se vi skribos 116-52 nombrojn 1, 2, 3, 4, k.t.p. ĝis 129 unu apud la 76-64-82-96, kaj sub la nombroj la literojn, kiujn vi trovis por la diversaj nombroj. Sufiĉas, se vi sendas la konkkludon kiel solvon. Ĉiu nombro ĉiam reprezentas la saman literon.

**Enigmo N-ro 36 :** Silab-enigmo. a - a - bu - ci - de - di - do - do - fan - fo - gas - gi - ĝo - hor - i - im - in - in - is - jo - ju - ka - ka - kap - kas - ki - klub - ko - ko - kon - kos - kre - kre - ku - la - lev - li - lo - lo - me - me - mi - mi - mo - mo - mo - mor - ni - ni - no - no - o - o - o - o - o - ol - pli - po - pre - prog - ra - re - re - ri - ro - ro - sis - so - sport - sta - ste - stru - ta - te - ter - ti - ti - to - to - to - to - to - tor - tri - tri - tro - tro - tu - vo - zi - zo.

El la supraj 92 silaboj formu 23 vortojn ; la nombro de literoj en ĉiu vorto estas indikata per la cifero inter krampoj malantaŭ la signifoj. La tria, kiel ankaŭ la sesa literoj en ĉiu vorto kune formas du konatajn proverbojn respektive.

Jen la signifoj : 1. malfaciligi (7), 2. nuligi (8), 3. frandulo (10), 4. enklasigi (9), 5. akvofalo (7), 6. timatulo (11), 7. ludilo kaj instruilo (12), 8. scienco (12), 9. mezuro (10), 10. antaŭdiro (8), 11. floro (7), 12. poŝtulo (9), 13. pagi (9), 14. pakmaterialo (12), 15. vestaĵo (7), 16. infanludo (7), 17. multuzata vorto (10), 18. scienco (8), 19. docento (10), 20. rezinarbo (7), 21. frandaĵo (10), 22. muzeokonservisto (8), 23. vestaĵo (9).

**Enigmo N-ro 37 :** Sur la ciferplato de horloĝo oni vidas 12 horciferojn kaj 60 minutoŝtriojn. Kioma horo estas, kiam unu el la monŝtrioj troviĝas 9 minutoŝtriojn preter iu horcifero, kaj la alia monŝtrio troviĝas 28 minutoŝtriojn preter la sama cifero ?

## Skoltismo

Por la okazo de la Internacia Jamboreo la Grupo Paul Arène en Sisteron, *Skoltoj Eclaireurs de France*, kun la helpo de lokaj samideanoj, starigos rondon de Esperanto-parolantaj skoltoj. La Ĉefskolto, Jean Pascal, rue Droite, Sisteron (Basses-Alpes), kore invitas alilandajn skoltojn viziti ilin. Skoltoj bonvolu fari kontakton pere de la Delegito en Sisteron : Paul Bernard, 63 rue Droite, Sisteron, B.A., Francujo.

P.B.

# INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 193

9an de Aprilo 1947

### NOVAJ DELEGITOJ

#### Danujo

**Frederikshavn.** D: C. Moller, Barfredsvej 66. Tel: 1006.

FD (Polico): La D.

#### Finnlando

**Iisvesi.** D: S-ino Martta Björk, Eevala, Iisvesi.

**Karjalohja.** D: Aarre Kunelius, Lehtola, Karjalohja.

#### Italujo

**Milano.** FD (Gravuraj aferoj): G. Marini, Piazza Selinunte 4.

FD (Politikaj kaj sindikataj aferoj): M. Balzanelli, Via Mercato 5. Tel: 14.100.

FD (Universitataj aferoj): Dott. V. Chiappa, Via San Giovanni sul Muro 9.

**Padova.** FD (Instruado): F-ino M. Marchesi, Via Conciapelli 3.

**Trente.** D: G. Marchetti, Via S. Croce 32 I/p. Tel: 20.46.

**Usmate.** D: F-ino P. De Gregori, Via Stazione 18.

#### Nederlando

**Groningen.** FD (Fervojoj): J. J. H. Teunissen, Molukkenstr. 19b.

**Hoogezaand.** D: H. Vinckers, Meidoornstraat 14, Oosterpark. Tel: 531.

**Leeuwarden.** FD (Muziko): A. S. Beuker, Bijenhofstraat 34.

### PATRONOJ 1947

20. S-ro G. P. Ferree, Mill Hall, Pa., Usono.

### MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

225. S-ro E. C. Pollock, Fallbrook, Calif., Usono.
226. S-ro F. W. Breth, Petrolia, Penn., Usono.
227. S-ro S. N. Bunch, Oklahoma City, Usono.
228. S-ro E. L. Clarke, Winter Park, Fla., Usono.
229. S-ro A. F. Doneis, Pharr, Texas, Usono.
230. S-ro F. H. Sumner, Portland, Ore., Usono.
231. S-ro P. H. Mooy, Brussel, Belgujo.
232. S-ro E. Carlén, Hällabrottet, Svedujo.
233. S-ro R. Robbins, Wanganui, Nov-Zelando.
234. S-ro A. Carmo, Petrópolis, Brazilo.
235. S-ro J. Poplawski, Poznan, Polujo.
236. S-ro A. Gluck, Bialakrak, Polujo.
237. S-ro R. de Luna Martí, Barcelona, Hispanujo.
238. S-ro Cz. Linda, Jelenia Góra, Polujo.
239. S-ino M. De Rijcke, Gent, Belgujo.
240. S-ro C. A. Baker, Exeter, Anglujo.
241. S-ro L. A. Churchill, Derby, Anglujo.
242. S-ro R. B. Gillett, Andover, Anglujo.
243. F-ino A. B. Howlett, Bushey, Anglujo.
244. S-ro H. H. Winter, Norwich, Anglujo.
245. S-ro K. Kopcewicz, Lodz, Polujo.
246. S-ro W. Kozłowski, Warszawa, Polujo.
247. S-ro L. Kulczycki, Zielonka, Polujo.
248. S-ro J. Piatkowski, Wrocław, Polujo.
249. S-ro W. Heap, St. Annes-on-Sea, Anglujo.
250. S-ro K. T. Hansen, Gentofte, Danujo.

**DONACOJ**—Cz. Linda 30s., D. B. Gregor 2s., R. Fiederović 3s. 4p., F-ino V. Cox 4s.

**DONACOJ** por helpi al la kosto de la Petskribo: G. Stone-Fry 10s. 6p., Lancs. kaj Cheshire Esp. Fed. 10s., Sennomulo 10s., E. G. Beard 2s.

### Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**JARLIBRO**—Ni bedaŭras, ke la Jarlibro iom malfrue aperos en la nuna jaro, pro kaŭzoj ekster nia dispono. La karbomanko kaŭzis la devigan fermon de ĉiuj presejoj dum tri semajnoj, kaj la kunfandigo kun U.E.A. necesigis kelkajn lastminutajn ŝanĝojn. Ni esperas ke ĝi eliros en Majo.

### STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 31a Marto 1947, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Marto 1946:

|                     | 1946 | 1947 |
|---------------------|------|------|
| Asociaj membroj ..  | 4198 | 4126 |
| Individuaj membroj: |      |      |
| MJ .. .. .          | 685  | 732  |
| MA .. .. .          | 2880 | 3883 |
| MS .. .. .          | 219  | 251  |
| Patronoj ..         | 23   | 20   |
| DM .. .. .          | 92   | 109  |
| HM .. .. .          | 19   | 20   |
|                     | 3918 | 5015 |
|                     | 8116 | 9141 |

CECIL C. GOLDSMITH,  
*Sekretario.*

### NASKIĜOJ

**Delcourt**—Al nia delegito en Ivry, Francujo, S-ro M. Delcourt, naskiĝis je la 23a Marto filino nomita Solange.

**Junier**—Al la delegito en Gray, Francujo, S-ro Geo. Junier, naskiĝis filino nomita Francoise Liliane je la 29a Marto.

**Tensen**—Al Ge-sroj J. Tensen en Amsterdam, Nederlando, naskiĝis je la 6a Aprilo filo nomita Paul.

**Viti**—Al Ge-sroj G. kaj R. Viti en Messina, Italujo, naskiĝis la 18an de Februaro filo nomita Pietro Paolo Antonio.

### ANIAJ MORTINTOJ

Kun profunda bedaŭro ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni esprimas nian sinceran kondolencan.

**S-ino Maria Boffejon** en Wilrijk, Belgujo, mortis la 29an de Marto 1947.

**S-ro Jules Borel**, de Couvet, Neuchâtel, Svislando, 6 Jan. 1947. Kune kun sia frato Jean Borel komencigis la publikan klopodon pri Esperanto en Berlino kaj en Germanujo (1905). Fondintoj de Esp. preseo kaj eldonejo kun sekcio por Esperanto. Jean Borel, la verkinto de la plej uzita gramatiko de nia lingvo por germanoj, forpasis 1946. Lia frato, konata eldonisto en Berlino, revenis pasintjare, ruinigita pro la detruo de sia florinta entrepreno, okupinta ĝis 200 personoj.

**S-ro J. de Lang** en Zwolle, Nederlando, mortis la 11an de Aprilo. Dum multaj jaroj li estis delegito de U.E.A., poste de I.E.L. Li estis tre bona propagandisto por nia movado.

**S-ro Rodolphe Waldburger**, multjara ano de UEA en Genève, subite mortis la 31an de Marto 1947.

**Ekslibrisojn** desegnas al vi artistino Annikki Arola, Somero, Finnlando. Sendu viajn karakterizaĵojn kaj dezirojn. Zorgos ankaŭ pri la presado sur bonkvalita papero. La ĉefdelegito garantias bonan kaj artan laboron.

**Filatelistoj!** Sendu al mi poŝtmarkojn kontraŭ egale multaj islandaj poŝtmarkoj. Helgi Jónasson, Jörta, Hnappadalssýslu, Islando.

**Libertempo.** Ĉeĥa 18-jara studentino deziras libertempe en Anglujo kaj reciproke gastigos studentinon aŭ studenton ĉe sia hejmo. Skribu senprokraste al F-ino Libuše Vlasáková, Stalinova 762, Mladá Boleslav, Ĉeĥoslovakujo.

**Mi korespondas** per il. pk. kun gesamideanoj el la tuta mondo. La plej belaj pk.-uzotaj por ekspozicio dum la Internacia Somera Lernejo en Doksy. Skribu al Václav Hašlar, bankoficisto, Doksy ĉe Mácha-lago, Ĉeĥoslovakujo. Respondo garantiata.

**Atentu!** Internacia Somera Lernejo (Seminario) en Doksy ĉe Máchalago, Ĉeĥoslovakujo aranĝota de 19.7—2.8.1947. Ni atendas amason da salutkraj kaj leteroj por leterespero. La plej intersajn oni rekompencos per libropremio, Esp. traduko "Nokto en Karlův Týn" de la ĉeĥa verkisto J. Vrchlický. La sama verko estas ludota okaze de la Somera Lernejo. Skribu al Esperantista Klubo en Doksy ĉe Mácha-lago, Ĉeĥoslovakujo.

**Dana pacifisto** deziras korespondi kun militrezistantoj ĉiulandaj. Sv. Cedergreen, Vendersgade 29-IV, København K., Danujo.

**Kontraŭ 25-50 vialandaj pm.** mi sendos egalkvanton; nepre respondos. H. Croizé, 5 Place du Commerce, Paris 15, Francujo.

**Mi interŝanĝas pm.** uzitajn kaj pk. Ĉiam respondas. S-ro R. Collet, 148 Faubourg Saint-Denis, Paris X, Francujo.

**Deziras korespondi** kun ĉiuj landoj, prefere kun masonistoj aŭ konstruteĥnikistoj pri fakaj demandoj Friedrich Köhncke, (24a) Hamburg-Wandsbek, Schillerstr. 21, Germanujo.

**Karl Ridder**, teĥnikisto (Esperantisto de 1932), Münster Westf., Warendorferstr. 133, Germanujo, deziras korespondi Esperante pri ĉiuj temoj. Respondo estas garantiata.

**Tre urĝa alvoko** al tuta Esperantista mondo! Al grava sukceso! Esperanto en ŝtataj instruistaj institutoj! Okaze de jubileo ĉiu povos efike helpi enkonduki Esperanton kiel instrufakon pruvante la valoron de Esperanto per alsendo de dokumentoj aŭ gratuloj. R. Loecx, Jubilea Komitato, Konijneparken 107, Boschvoorde-Brussel, Belgujo.

**12 gejunuloj** progresantaj serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Skribu al Jack Couche, Anglesea Barracks, HOBART, Tasmania, Aŭstralio.

**Himno esperantista**—LA ESPERO—nova melodio, aranĝita por ŝolkantado kun fortepiano, ricevebla kontraŭ 5 respondokuponoj ĉe la komponisto, S-ro Nat. Svanholm, Wennerbergs gata 4, Skövde, Svedujo.

**Tutmondaj Esperantistoj!** Interŝangu kun mi belajn il. pk. kaj fotojn. Respondo garantiata. Jos. Hanzelka, Ostrava-Kuncický 531, Ĉeĥoslovakujo.

**Fraŭlino Joy Bolton**, 12-jara, dez. interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la tuta mondo. Espero, 39 Queen's Avenue, Dorchester, Dorset, Anglujo.

**Miaj ĝelernantoj (10-13 jaraj)** deziras korespondi kun junaj ĝesperantistoj en ĉiuj landoj. Skribu al F-ino T. Putto, Parkweg 31, Ede (Gld.), Nederlando.

**S-ro F. S. Almada**, Banco do Brasil, Santos, Brazilo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

**Hungara Esperantista filatelisto** deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj belajn poŝtkartojn kun tutmondaj gesamideanoj. S-ro Eugén Szereďai, Cserzy Mihály 3, Szeged, Hungarujo.

**Kiu volas** interŝanĝi bildkartojn kun juna ŝtalindustria laboristo? Danke respondos S-ro Birger Sjöberg, Box 88, Avesta, Svedujo.

**Mi deziras interŝanĝi** poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj; respondo garantiata. Pierre Bouquere, 74 rue de Verdun, Bagneux (Seine), Francujo.

**Leteresperon** ni aranĝos dum Junio por niaj ĝelernantoj. Skribu multnombre; afranku filatele. Ge-sroj Volpelière, 19 Rue Monjardin, Nîmes, Francujo.

**D-ro Giuseppe Crippa**, Via Poma 10, Milano, Italujo, deziras ekkoni vialajn lertajn Esperantistinojn okaze de Berna Kongreso. Eventuale vojaĝo tra Italujo.

**Skoltismo-Komerco.** Oni petas dusemajnan gastadon por tri skoltoj esperantistaj ĉe jamboreo, reciprokante en Italujo. Virinstrumojn pursilkajn tre elegantajn liveras pogrande, detale. Mendu specimenon. Lovati, Via Lipari 8, Milano, Italujo.

**Odontoteĥnikisto** deziras korespondi kun odontoteĥnikistoj de ĉiuj landoj. S-ro Della Donna Stefano, Via Digione 5, Torino, Italujo.

**Poŝtmarkojn** mi deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj. S-ro Zerbino Giuliano, Via Cellini 36, Torino, Italujo.

**Amikoj, helpu solidare!** Al la Internacia Muzikfesto (Llangollen, 11-15 Junio) venos du Esperantistaj ĥoroj—bonega rezulto!—sed tre malkas al ni salutleteroj por imponi la "British Council" kiu organizas ĝin kaj akceptis Esperanton. Sciuj, ke la Festo okazos de nun ĉiujare. Esperanto pli kaj pli rolu! Ni kore petegas: sendu amase salutleterojn opajn, kolektivajn, por ekspozicio. Vi ricevos Esperantan prospekton kaj belan artaĵon. S-ino C. Roseti, Ponciau, Wrexham, Britujo.

**45-jara Germano** korespondos kun ĉiuj landoj. Mi certe respondos. Willi Klingenberg, Hildesheim, Lappenberg 1, Germanujo (Brita Zono).

## FABRIKISTOJ

## EKSPORTISTOJ

## IMPORTISTOJ

Kion vi havas? Kion vi bezonas?

Ni invitas vin sendi kompletajn detalojn pri viaj komercaĵoj.

Skribu al:

## CULELL EKSPORTADA KOMPANIO

Box 18, Bentleigh, Victoria, Aŭstralio

# ELDONITAJ DE ESPERO KATOLIKA

**FABIOLA.** (Rakonto pri la katakomboj). KARDINALO WISEMAN.

El la angla lingvo tradukis E. RAMO.

Bindita, 436 paĝoj. Prezo 15\$, afranko 9p.

**KAPTITAJ EN NUBIO.** HENRYK SIENKIEWICZ.

Esperantigita de FRATO WIGBERTUS VAN ZON.

Broŝ. 120 paĝoj. Prezo 3\$, afranko 4p.

**KLARI.** MYRIAM CATALANY.

El franca lingvo tradukis EM. ROBERT.

Broŝ. 136 paĝoj. Prezo 3\$, afranko 3p.

**LA ORIGINO DE LA RELIGIO.** Originale verkis Jos. SCHMIDT.

Broŝ. 32 paĝoj. Prezo 1\$, afranko 1p. (4 rpk.)

*Mendu ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de Esperanto*.

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta ; la lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto . . . la trazoj portas la stampon pri instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon . . . La rezulto estas libro pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla . . ."—*Esperanto Internacia*.

531 paĝoj, 19 × 14 cm., broŝ. 10\$. 6p.,

tole bind. 12\$. 9p., duonlede bind. 25\$. 6p.,  
afranko 9p.

**Mendu ĉe I.E.L.**

## ARTA VIDAĴLIBRO DE TUT-MALAJO

grandeco 22 × 28 cm., bele bindita ;  
pli ol 40 famaj kaj modernaj bildoj.

Esperante kaj angle klarigitaj.

**Kompleta serio de Japanaj Banknotoj**  
en Malajo. 1 c. ĝis \$1000, tute novaj.

Prezo por ambaŭ sendaĵoj \$2 usonaj.

*Mendu ĉe*

**S-ino T. F. Liang, Hou Chio Public School,  
897 North Bridge Road, Singapore, Malajo.**